

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

KUNLABORADO
KUN UNESKO

KONGRESOJ '88

ORIGINALA
VERKARO

EN LA
LIBROVENDEJO
DE BEA

ESPERANTO
KAJ KOMPUTILOJ

100 TAGOJN
EN BULGARIO

TRA LA MONDO



Kunlaborado kun Unesko sur nacia nivelo

En decembro 1954 la Generala Konferenco de Unesko, okazinta en Montevideo, akceptis rezolucion pri Esperanto. En ĝi estas notitaj la rezultoj, atingitaj pere de Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por proksimigo de la popoloj de la mondo kaj ĝi rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko. La Generala Konferenco komisiis al la Generala Direktoro sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en la scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio (UEA) en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn. Per du decidoj la sama Generala Konferenco fiksas la formalan evoluon de la rilatoj inter UEA kaj Unesko kaj starigis inter ili konsultajn rilatojn de kategorio „B“.

Tiel komenciĝis aktiva kaj fruktodona kunlaborado inter UEA kaj Unesko. UEA aliĝis al la Konferenco de Neregistraj Organizaĵoj en Konsultaj Rilatoj kun Unesko, kaj nun ĝi estas unu el la gvidaj anoj de tiu konferenco. Jam en 1979 ĝi elektiĝis al ties 15-membra Konstanta Komitato. UEA estas gvidanto de Laborgrupo pri Problemoj de la Komunikado. En 1977 la eksa Ĝenerala Direktoro de Unesko s-ro Amadou Mahtar M'Bow persone ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto en Reykjavik kaj faris la ĉefan paroladon. En marto 1981 li akceptis delegacion de UEA en Parizo. Krom UEA, kun Unesko kunlaboras ankaŭ unu el ties ĉefaj fakaj organizaĵoj, la Internacia Ligo pe Esperantistaj Instruistoj, kiu troviĝas en la kategorio „C“, tiu de recidrok informado. La kunlaborado kun Unesko de UEA kaj de la Internacia Ligo re Esperantistaj Instruistoj konsiderinde kontribuis por plialtigo de la aŭtoritato de UEA bternaciskale. Logika sekvo de tiu ĉi kunlaborado estis la akcepto en 1985 de la rezolocio de Unesko pri Esperanto kaj la celebrego ĉia centjara jubileo.

Gis nun la kunlaborado de UEA kun Unesko tamen disvolvigis nur sur internacia nivelo. Ne estas informoj pri konstanta kunlaborado kun Unesko sur landa nivelo, t. e. inter la landaj Esperanto-asocioj kaj la naciaj komisionoj pri Unesko, kiaj ekzistas en ĉiuj ŝtatoj-membroj de Unesko. La naciaj komisionoj pri Unesko estas organizoj, kiuj kunordigas la aktivadon de la ŝtataj sciencaj, klerigaj kaj kulturaj institucioj kaj de sociaj organizaĵoj, kiuj partoprenas en la realigo de diversaj programoj kaj projektoj de Unesko.

Konsiderante, ke ankaŭ ĝi povas partopreni en la realigado de iuj el la programoj de Unesko, fine de 1985 Bulgara Esperantista Asocio turnis sin kun peto esti akceptita kiel kolektiva membro de la Nacia Komisiono de Popola Respubliko Bulgario pri Unesko. La peto estis kontentigita. La reprezentanto de BEA ĉeestis la jarkunvenojn de la Komisiono, sed la Asocio ne faris konkretajn proponojn pri partopreno en ĝia aktivado. Estis nur sporadaj manifestiĝoj de kunlaborado. Mirĉo Arsov, plenumanto de la ofico de ĉefsekretario de la komisiono, ĉeestis la solenan kunvenon dediĉitan al la centjara jubileo de Esperanto, kiu okazis la 13-an de junio 1987 en Sofio.

Unisone al la entreprenita rekonstruado de la laboro de BEA, la lasta aktiviĝis ankaŭ sur la priparolata kampo. La reprezentanto de BEA Dimităr Haĝiev ĉeestis la jarkunvenon de la Nacia Komisiono, kiu okazis en Sofio la 24-an de februaro 1988. La kunvenon ĉeestis ĉirkaŭ 300 personoj — elstaraj scienculoj kaj agantoj en la sfero de klerigado kaj kulturo. Haĝiev estis inter la 12 partoprenintoj en la diskutoj pri la agado de la Komisiono dum 1987 kaj pri la bazaj direktoj de la komisiona agado dum 1988. Bazante sin sur la du rezolucioj de Unesko pri Esperanto de 1954 kaj 1985, li informis la kunvenon pri la instruado de Esperanto en lernejoj kaj superaj klerigaj institucioj en Bulgario kaj pri la atingitaj rezultoj en 1987, same kiel pri la celebrado de la 100-jara jubileo de Esperanto en nia lando. En sia eldiro li samtempe konturis la kampojn, sur kiuj BEA povus sukcese kunlabori kun la Nacia Komisiono, nome: sur la kampo de edukado — en spirito de paco, internacia kompreniĝo kaj internacia kunlaborado, de respektado de la homrajtoj kaj bazaj liberecoj laŭ la rekomendo de Unesko de 1974; partopreno en realigo de la programo de la Monda Jardeko por Evoluoj de la Kulturo (1988-1997); certigo de partopreno de infanoj-esperantistoj el Bulgario kaj el aliaj landoj en la Internacia Asembleo „Standardo de la Paco“ kaj en la popularigo eksterlande de la Movado „Standardo de la Paco“; partopreno en la celebrado de rondaj datrevenoj kaj en manifestiĝoj celantaj popularigon de la agado de Unesko kaj de la Nacia Komisiono de PR Bulgario pri Unesko, kiu estas unu el la plej aktivaj naciaj komisionoj pri Unesko.

La kunlaborado de BEA kun la Nacia Komisiono de PR Bulgario pri Unesko certe kontribuos por plialtigo de la aŭtoritato de BEA en nia lando kaj por la pliriĉigo de ĝia agado.

Dimităr HAĞIEV



POR PACO SUR LA BALKANOJ

En la fruaj jaroj de nia jarcento politikistoj, diplomatoj kaj ĵurnalistoj nomis la Balkanan Duoninsulon „pulvotenejo“ de Eŭropo. Dum sangoverŝaj militoj inter la balkanaj landoj pereis centmiloj da homoj. Malamikeco, malfido kaj ŝovinismaj pretendoj karakterizis la politikan klimaton en tiu eŭropa regiono.

Nur antaŭ du jardekoj komenciĝis proceso de plivigligo de la duflankaj rilatoj inter iuj balkanaj landoj, kio iom post iom kondukis al la ideo pri multflanka balkana kunlaborado. La unuaj paŝoj estis kuraĝigaj. Realigis reciprokaj vizitoj de ŝtatestroj, komenciĝis interŝanĝo de delegitaroj, de kulturagantoj, sportistoj k.a.; plivigligis ankaŭ la ekonomiaj kontaktoj... Cio ĉi kreis klimaton favoran al la ideo lanĉita de Socialisma Federacia Respubliko Jugoslavio pri renkontiĝo de oficialaj registaraj reprezentantoj de la ses balkanaj ŝtatoj. Tiu iniciato trovis plej vastan apogon. Ĝia realigo tamen estus multe pli malfacila, eĉ neebla, se ne estus la serenigo de la internaciaj rilatoj, la nova politika pensmaniero. La sovetusa kontraktado pri likvido de du klasoj de nukleaj armiloj — de mezdistancaj kaj malpli granddistancaj raketoj, kreis esperigan perspektivon pri decidaj paŝoj en la sfero de malarmado.

La vojo al la Renkontiĝo de la Ministroj por Eksterlandaj Aferoj de la ses balkanaj landoj en Beogrado (24—26. II. 1988) ne estis facila. Multe da penadoj, pacienco kaj reciproka fido estis necesaj, por ke la reprezentantoj de la diplomatio de la balkanaj ŝtatoj eksidu kune ĉirkaŭ

la Ronda Tablo. La bulgara registaro proponis konkretajn iniciatojn pri plibonigo kaj disvolvado de la rilatoj. Dum siaj renkontiĝoj kun ŝtatestroj de la balkanaj landoj, nia ŝtata gvidanto Todor Ĵivkov proponis transformon de la Balkanoj en zonon sen nukleaj armiloj, subskribon de duflankaj kontraktoj pri bonnajbaraj rilatoj kaj kunlaboro, kiuj trovis komprenon en la politikaj medioj de la regiono.

La Renkontiĝo de la Ministroj por Eksterlandaj Aferoj de la balkanlandoj en Beogrado jam estas fakto, la rezultoj — esperigaj. Tiu unua senprecedenca forumo de la balkana diplomatio planis multajn utilajn iniciatojn en la sociala, kultura, ekonomia kaj ekologia sferoj, kiuj estos bazo por estonta ĉiam pli vigla kunlaborado en spirito de paco kaj reciproka fido.

Cio ĉi kreas favoran klimaton ankaŭ por plua disvolvado de la rilatoj inter la esperantistoj el la balkanaj landoj. Ili jam realigis kelkajn interesajn iniciatojn dum la lastaj jaroj: Renkontiĝo de Esperantistoj el la Balkanlandoj en 1983 en Bankja (Bulgario); Kongreso en Ateno (1984), reciprokaj vizitoj de bulgaraj, grekaj, jugoslavaj esperantistoj; spektakloj de la Bulgara Esperanto-Teatro en Zagrebo (1987); kelkfoja aktiva partopreno de niaj „Verdaj Steletoj“ en la festivaloj de PIF en Jugoslavio. Do fakte jam estas konstruita solida bazo por plivigligo de la rilatoj inter la balkanaj esperantistoj. Kaj oni devas daŭrigi tiun komencon per interesaj kaj variaj iniciatoj.

73-a Universala Kongreso de Esperanto

23—30.VII.1988, Roterdamo (Nederlando)
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam

Loka Kongresa Komitato: Kvankam la Kongreso okazas sub plena financa respondecado de UEA kaj la ĉefajn preparlaborojn faros la Centra Oficejo, kreiĝis LKK, konsistanta el bonvolaj helpemuloj el la tuta lando: s-ino Ans Bakker-ten Hagen — prezidanto; s-ino C. Bossong-Singer — ekskursoj; J. Calado — kongresejo; s-ino L. Demmendaal — programo; R. Ebenau — komercaj rilatoj; s-ino M. Erasmus-van Zadelhof — gazetaro; W. Pilger — artaj aranĝoj; s-ino R. Ruig-de Vries — sekretario; s-ino E. van Dijk — ĝiĉetoj. Flanke de la CO pri la Kongreso ĉefe okupiĝas P. Zapelli (administrado) kaj S. Milojeviĉ (kunordigo de la laboroj).

Unua Bulteno: Jam antaŭ la UK en Varsovio aperis bela plenkolora Unua Bulteno en 20 000 ekz. La prospektojn, kiuj servis por la bulteno, donacis KLM, kiu estas ankaŭ la Oficiala Flugkompanio de la Kongreso. La bulteno kaj la aliĝilo estas senpage riceveblaj ĉe la konstanta adreso.

Kongrestemo: La oficiala kongresta temo estas „Scienco kaj tekniko por

internacia kompreniĝo“. Oni planas abundon kaj varion de la programeroj, kiuj traktos la kongresan temon: prelegoj, diskutoj, laborgrupoj, ekspozicioj, studvizitoj ktp.

Programo: Estas planata abunda kaj varia programo, kun eblecoj de spontanea elpaŝo de novaj talentoj. Apartan atenton oni dediĉos al la edukaj kaj instruaj programoj. Speciala sekcio de la programo traktos la agadon de UEA kadre de ĝia 80-jara jubileo.

Loĝado: Oni jam blokis adekvatan nombron de ĉambroj en la plej proksimaj rotterdamaj hoteloj: unu nokto kun matenmanĝo kostas inter 50 kaj 100 gld. Disponeblos ankaŭ junulargastejo (ĉ. 25 gld) kaj komuna loĝejo.

Infana Kongreso: Aliĝkotizo de 150 gld. inkluzivas kompletan semajnan prizorgon por 6-13-jaraj infanoj flue parolantaj Esperanton. Informoj ĉe la konstanta adreso.

(El „Heroldo de Esperanto“, n-ro 1, 1.I.1988)

JUNULARA KONGRESO EN ZAGREBO

(16—23. 7. 1988)

La 44-a Internacia Junulara Kongreso okazos en la ĉefurbo de Kroatio, unu el la ses federaciaj respublikoj de Jugoslavio, en la urbo, kiu pruvis sian kompetenton gastigi internacian junularon dum la „Universiada 87“.

La kongresta temo „Komunikado en la 21-a jarcento“ plene turnita al la futuro, ebligas konatiĝon kun la komputila mondo en plej diversaj manieroj, per prelegoj, eksperimentoj,



ekspozicioj, diskutoj kaj polemikoj.

Kiam vi ne diskutos en

tiusomera semajno de la 16-a ĝis la 23-a de julio 1988, vi povos bani vin en kelkaj zagrebaj naĝbasenoj aŭ en la rivero — ankaŭ ripozi en la mezurba arbaro. Restadkostoj en la Lerneja Centro ekipita per kino- kaj teatrosalonoj, sumas inter 210 kaj 480 gld., depende de la aĝo kaj aliĝdato. Bonvenon al vi deziras: LKK Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, YU-41000 Zagreb.

(El „Heroldo de Esperanto“ n-ro 16/1987)

LA EKSPERIMENTO — PROBLEMOJ KAJ ESPEROJ

Dum la lastaj jaroj regule aperas artikoloj kaj informoj pri la unua klaso eksperimente lernanta Esperanton, en 8-a mezlernejo „Vasil Levski“ en Sofio. Dum certa tempo mi havis preskaŭ regulajn kontaktojn kun la lernantoj. Poste, iom post iom, nia reciproka intereso ĉesis. Nur de tempo al tempo mi vidis iun el ili deklami dum arangoj de la Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „Maksim Gorkij“. Jam finiĝis la unua parto de la eksperimento. Finas la mezlernejojn la unuaj geknaboj, kiuj dum 3 jaroj devige lernis Esperanton. Dum kunsidoj kaj konferencoj oni laŭdas la bonan komencon, sed ĉu efektive ĉio estas laŭdinda?

La 15-an de decembro 1987 mi ĉestis solenaĵon laŭ invito de la Instruistino de Esperanto en 8-a lernejo — Ivanka Spasova. La halo estis plena de geknaboj. Mi ne kaŝos, ke mi emociiĝis vidinte tiom multe da junaj homoj, kiuj lernas la Internacian Lingvon.

Komenciĝis la disdono de la diplomoj. Mi serĉis konatajn vizajojn, sed... ho, ve! Mi ne vidis tiajn. Kie estis la lernantoj el la eksperimenta klaso? Ĉestis kaj diplomiĝis pri III-a grado nur 7 el ili. Kaj la ceteraj? Ili evidente ne lernis bone kaj tial ne ekzameniĝis. Sed ĉu la kulpo estis nur ilia? Mi dubas. Kial do en tia okazo pri II-a grado sukcese ekzameniĝis 18 lernantoj (ĉ. 50% el la klaso, kiu lernis devige Esperanton) kaj pri la I-a grado — 37 lernantoj (100%). Certe la kulpon ni devas serĉi ankaŭ ĉe ni — ĉe ĉiuj, kiuj komencis la eksperimenton aŭ rilatis iamaniere al ĝi.

Eble multaj respondeculoj ne scias, ke al la unua E-klaso oni promesis multon — preskaŭ la tutan mondon. Oni lanĉis ideojn pri profesia okupado pri Esperanto, pri studado en universitato, pri la grandaj eblecoj, kiujn malkovras antaŭ ili eĉ meze bona scio de la lingvo. Mi ne citos la nomojn de la personoj, kiuj „zorgis“ pri la eksperimenta klaso kaj inspiris al la geknaboj esperojn ne realigeblajn. Ili feritis senpage en IEK-Pisania. Ekzistis propono, ke ili kongrese senpage ankaŭ en Pollando pasintjare. Oni tiom multe kaj senprincipe promesis al la geknaboj kaj al ties gepatroj, sed reciproke oni nenion postulis. La promesoj ne estis plenumitaj. La lernantoj disreviĝis

kaj ilia intereso al Esperanto elvaporigis. La komenco vere estis bona, sed la daŭrigo kaj la fino — ne tiom. Konsolas nin nur la fakto, ke momente 37 geknaboj lernas por I-a grado, tiuj kiuj ne sukcesis diplomiĝi pri II-a grado petas ekstran ekzamenon kaj daŭre studas. Certe, la dua kaj la tria klaso finos sukcese la studadon. Jam elstaras inter ili aktivuloj. Sed ankaŭ pri ili ni devas pensi. Kion ni proponas al ili? Ĉu la ĉiumerkedaj arangoj de la Sofia Kulturdomo, kvankam tre bone organizitaj kaj interesaj por ni, taŭgas por la junuloj?

Estis bonega ideo, pri kiu oni devas danki al Ivanka Spasova. Si invitis al la solenaĵo la kantgrupon „Era“ (Erao), tre famiginta lastatempe en Bulgario. La anoj de la grupo interparolis kun la lernantoj, respondis al multaj demandoj, disdonis siajn fotojn kun aŭtografaj kaj kantis kelkajn kantojn en Esperanto. La fakto, ke „heavy-metal“—kantojn oni povas aŭskulti en Esperanto ege efikis sur la geknabojn. Ili mem konvinkiĝis, ke la lingvo estas taŭga por ĉio. Jen kiel facile oni faris pli bonan propagandon de Esperanto ol pere de longa kaj ofte ne bone komprenebla por ili parolado pri ĝiaj ecoj.

Estas en la spirito de nia nuntempo kritiki. Sed la kritiko tute ne estas utila, se oni ne montras eliron. Mi do proponas: Ne permesi al iu ajn aktivulo, dum vizito al la E-klaso, fari neplenumeblajn promesojn, cele instigi la geknabojn lerni; havigi al ili taŭgajn lernolibrojn kaj al ilia instruisto — celkonformajn programojn kaj instruhelpilojn; per konvenaj arangoj altiri la geknabojn al nia movado — ne dorloti ilin, sed postuli de ili bonajn rezultojn kaj eduki ilin en la spirito de la porpacaj ideoj de la esperantismo.

Mi kredas, ke ekde nun la Instru-Komisiono ĉe BEA prizorgos la sekvajn klasojn kaj ĝi dividos al ili pli da atento ol tion faris la ĝisnuna Urba Estraro. La eksperimento daŭros plu kaj ni esperas, ke la rezultoj estos pli kontentigaj.

Veneta BALEVA,
estrarano de Bulgara Esperanto-Junularo

KUNSIDO DE LA KOMISIONO PRI INSTRUA KAJ SCIENCA AGADO

La 6-an de februaro j. k. okazis la unua kunsido de la Komisiono pri Instrua kaj Scienca Agado ĉe BEA (KISA). Ĉestis la novelektitaj membroj Violin Oljanov, Nedka Valjaviĉarska, Libertaria Mladenova, Marin Bacev, Fani Miĥajlova, Bistra Dojĉinova, Bojan Lalov, Slavjanka Kapeva, Vanja Spasova, Andrej Angelov kaj Maria Pejкова. Forestis nur Angel Todorov.

Grava momento en la laboro de la kunsido estis distribuo de la taskoj inter la komisionanoj jene: Violin Oljanov, prezidanto, respondecas pri la kompleta instrua kaj scienca Esperanto-agado; N. Valjaviĉarska, sekretario, organizas plenumon de la taskoj, kontaktas klerigajn instituciojn, zorgas pri interŝanĝo de metodika sperto lige kun fremdlingva instruado; L. Mladenova — Instruista Sekcio, kvalifikado, tradukistoj; M. Bacev — korespondaj kursoj, metodika agado, bultenoj „Informilo“ kaj „Filologo“; F. Miĥajlova — Esperanto-kursoj en superaj lernejoj; B. Dojĉinova — esploro de statistikaj informoj; B. Lalov — scienca agado, teknikaj instruhelpiloj; S. Kapeva — civitanaj Esperanto-kursoj; V. Spasova — fakultativa instruado; A. Angelov — instruagado en Esperanto-societoj; A. Todorov — instruarangoj en la Internacia Esperanto-kursejo; M. Pejкова — veterano.

Diskutante la staton de la kursoj, KISA akceptis Strategian Planon de la Eksterlerneja Esperanto-instruado.

Oni pridiskutis ankaŭ la organizon de la feriaj kursoj, nome porinstruitaj E-kursoj, kvalifikaj kursoj por E-diplomitoj kaj internaciaj E-kursoj en IEK.

N. VALJAVIĈARSKA

Esperanto en la malliberejo

Memore al Asen Grigorov

[La Esperanto-movado ampleksas plej malsamajn tavolojn de la homaro, tamen ĝia fundamenta parto restas tiu ĝia progresema kaj laborula parto, kiu nek kalkulas je interŝtataj konfliktoj, nek incitas ilin. Pro tio la internacia revolucia movado estas bonefika grundo, sur kiu aparte abunde kreskas ĝiaj ideoj.

La monarko-faŝisma reĝimo en Bulgario observis kun akrigita atento la agadon de la Esperanto-societo en la lando, kaj la plej aktivajn esperantistojn, cenzuris la internacian korespondadon...

Tial tute logike kaj nature kelkaj esperantistoj trafis la medion de la politikaj malliberuloj en la Sofia Centra Malliberejo, kiuj dum la lastaj jaroj de la perarmila rezistado antaŭ la 9-a de septembro 1944 estis malliberigitaj konforme al la Lego por Defendo de la Stato (komprene: defendo de la cara ŝtato!).

[Rekonita gvidanto de la esperantistoj en la malliberejo ekde 1941 estis Asen Grigorov — ĉiam optimisme ridetanta, kvieta kaj ĉarma kunparolanto kaj kamarado.

[Jam per sia apero en la oka fako de la malliberejo Asen Grigorov enportis sian aldonan esperantistan optimismon meze de la ceteraj malliberuloj. Ĉiuj ekamis lin kaj serĉis lian kompanion por plej neatenditaj konsiloj, diskutoj, rezonadoj. Kaj li penis kontentigi ĉiujn per sia granda homa koro, per eksterordinaraj atentemo kaj amo.

[Kiam Asen Grigorov eksciis pri la nova juĝproceso, en kiu mia mortkondamno estis anstataŭigita per kondamno al dekkvinjara malliberigo,

li delikate alpaŝis al la pridiskutado de evidente delonge lin okupanta demando: temis pri mia kontribuado al la projektita de li Esperanta mallibereja kajero * — siaspeca konspira gazeto, eldonata enkadre de efektiva kajero, skribata mane en unu ekzemplero. La materialoj, publikigitaj en tiu ĉi kajero, devis esti originalaj, verkitaj kaj kompilitaj de la politikaj malliberuloj mem kaj kompreneble, respektive redaktitaj de k-do Grigorov kaj transskribitaj de kaligrafo, posedanta Esperanton. Unu el la postuloj, kvankam ne ĉiam strikte observata, koncernis la lingvon de la korespondaĵo. Ĝi devis esti Esperanto. Tio ĉi ludis strange stimulantan rolon. Multaj komencis lerni Esperanton.

Tiuj el la malliberuloj, kiuj simile al mi havis antaŭan preparon de „ekstere“, progresis rapide kaj povis transdonadi siajn verkojn en tolerebla Esperanto. La korektado de la materialoj fare de Asen Grigorov estis eksterordinare rezultodona formo de perfektigo por la aŭtoroj. Kaj iliaj sekvaj korespondaĵoj montris evidentan plibonigon de iliaj konoj kaj lerteco. Sed ne nur rilate la lingvon. La instruado evidentiĝis utila ankaŭ por plialtigo de la majstreco en la verkado, por pliriĉigo de la pensado kaj por pli preciza esprimado.

Precipe forte sentiĝis tiu ĉi pedagogia aspekto de la kunlaborado, en kiun enlogis min

k-do Grigorov, ĉe la sinsekva „publikigo“ de la laŭvica „feliĉetono“. „En la ĉelo de la morto“, kelkaj versaĵoj kaj rakontoj priskribis la animstaton de unu kaptito de la monarkofaŝismo, trapasinta tra la polica juĝesplora maŝino, tra la ĉiaspecaj psikaj kaj fizikaj rondoj de la mallibereja infero, lian aperon antaŭ la milita tribunalo, la malegalan duelon de la premfrakasita juĝato kun la aroganteco de la oficira konsisto de la tribunalo kaj de la milita prokuroro.

La junaj laŭ aĝo kaj „politikmalliberula“ staĝo kamaradoj dividis la travivaĵojn elvokitajn de la tralegitaĵo, kaj la eblecon, kiun ili akiris por trovi aldonajn „apogpunktojn“ por sia konduto, precipe ĉe rea trafo en la policon kaj antaŭ la militan tribunalon. „La Esperanta kajero“ tiurilate havas certan kontribuon por la morala-politika elkresko de junaj kaj maljunaj malliberuloj.

Ĝis kiam daŭris la aperado de nia esperanta gazeto mi ne povas diri, ĉar la plenplenigo de la Sofia Malliberejo per arestatataj agantoj de la perarmila rezista movado devigis la caran registaron „inventi“ la malliberulan labortendaron „Dinevo“ apud vilaĝo Dinevo, distrikto de Flaskovo kaj komisii al ni la fosadon de kanalo por la korekto de la fluejo de Dineva-rivero. Sed la memoro pri „La Esperanta kajero“ estas viva ĉe mi eĉ nun, 46-jarojn poste.

Stojan KONSTANTINOV

* Noto de la tradukinto el bulgara lingvo Dimităr Haĝiev: Sub titolo „En la malliberejo“ rememorojn pri la instruado de Esperanto kaj pri la eldonado de „La Esperanta kajero“ en la malliberejo publikigis Asen Grigorov en n-ro 3/novembro 1945 de revuo „Internacia Kulturo“, kies redaktoro li estis.

DOCENTIGO DE D-RO DETLEV BLANKE

La ministro pri altlernejaj kaj faklernejaj aferoj de GDR la 1-an de februaro 1988 nomumis d-ron sc. Detlev Blanke „Honoraria docento“ por interlingvistiko en la Humboldt-Universitato de Berlino. Per tio la fako „Interlingvistiko“ estas oficiale ligita al la soci-sciencia fakultato de la universitato. La docenteco ebligas certigi sisteman prelegadon kaj instruadon, stimulan de diplomlaboraĵoj, doktorigaj disertaĵoj kaj de aliaj universitatnivelaĵoj aktivecoj. Post la Eötvös Lóránd-Universitato en Budapeŝto la Humboldt-Universitato en Berlino estas la dua en la mondo, kiu enkondukis interlingvistikon en la rango de docenteco.

D-ro Blanke, kiu ekde la nomumigo ankaŭ apartenas al la altlerneja instruistaro de la universitato tamen restos sekciestro en Kulturligo, kiu plene subtenas lian novan sciencan agadsferon.

INFANA EKSPOZICIO

Popola lernejo de artoj en Žacléř en kunlaboro kun E-klubo en Trutnov kaj CEJ aranĝas internacian ekspozicion de infanaj artverkoj „Ĝlosilo en regnon de fabeloj“.

Ni petas ĉiujn infanojn, kiuj ŝatas pentri aŭ modli, pri partopreno.

Tekniko: libervola. Aĝo de partoprenantoj: ĝis 18 jaroj. Plastikajn verkojn bonvolu indiki: lando, nomo (knabo, knabino), aĝo kaj logloko de aŭtoro.

Ĉiuj partoprenantoj ricevos memoraĵon.

Sendu artverketojn ĝis 20.9.1988 laŭ adreso: LŠU, 54201 Žacléř, Ĉeĥoslovakio

ATENTON!

Boris Marinov el Velingrad serĉas kunlaborantojn por preparo de Esperanta-bulgara vortaro de forskulturaj terminoj. Por pli detalaj informoj bonvolu turni vin al: Boris Marinov, str. Puĉini 6, 4600 Velingrad — tel. (0359) 3623.

INTERNACIA E-ADRESARO ELDONOTA

Esperantista Societo „Kulturo“ en Ruse preparas dum 1988 jaro eldonadon de adresaro de esperantistoj el la tuta mondo.

✱ Ni petas skribi klare preslitere vian nomon kaj adreson.

✱ Sendu minimume unu respondkuponon aŭ tri bildkartojn. Adreso: Bulgario, 7000 Ruse, p. k. 208, Esperantista Societo „Kulturo“.

Propono

NI BEZONAS ESPERANTAN LEGAJON

Dum la lernojaroj 1986—1987 ni lernis Esperanton (unua kaj dua grado) en specialaj kursoj por turistoj. En la daŭro de la kurso nia kursgvidantino Stefka Ĉenkova parolis al ni ankaŭ pri la E-movado kaj la esperantismo, instigis nin partopreni E-aranĝojn. Dank' al ŝi multaj el la kursanoj nun aktivas en la Esperanto-organizaĵoj de la ĉefurbo.

Por plibonigi nian lingvoscion ni strebas legi Esperantan literaturon. Ni jam havas Esperanto-fakon en niaj hejmaj bibliotekoj. Bedaŭrinde ili ne estas tre riĉaj, ĉar krom Esperanto-lernilojn, en Bulgario oni vendas ne multajn titolojn, kaj la pliparto el ili estas verskolektoj. Ne nur ni, sed ankaŭ la malnovaj esperantistoj en la ĉefurbo ne povas aĉeti kaj legi verkojn de la klasikuloj (Zamenhof, Kabe, Privat), de modernaj E-aŭtoroj, tradukojn k. a. La importataj Esperatolibroj estas en tre limigita kvanto. La finintoj de la kursoj bezonas facilan, sed interesan legaĵon, kia mankas en la lando. Tiu estas la ĉefa baro sur la vojo de la bulgaraj esperantistoj al bona posedo de la lingvo.

Por ke la bulgaraj esperantistoj povu legi Esperatolibrojn, gazetojn, revuojn kaj broŝurojn, estas necese urĝe establi centran bibliotekon kun legejo. Tion devas fari la estraro de la Esperanto-Domo de Kulturo. Dum la biblioteko ankoraŭ ne havas ejon, oni povas preni kaj redonadi librojn antaŭ la komenco de la merkredaĵ aranĝoj de la Domo. Komence oni povas cirkuligi inter la esperantistaro la librojn de la eksa urba estraro de BEA en Sofio.

Ni esperu ke nun, kiam la esperantista agado estas reorganizata, oni turnos atenton al nia propono kaj ĝi estos realigita.

Riĉa E-biblioteko kun legejo devas esti en ĉiu urbo kaj vilaĝo, kie estas vigla movada agado.

Sonja KOLEVA kaj Ivan IVANOV,
gvidantoj de la turista E-grupo
„Gajaj Migrantoj“

Antaŭ nelonge forpasis la malnova esperantistino Stefana Donĉeva Aleksleva, edzino kaj vlykamaradino de la konata esperanto-veterano Nikola Aleksiev.

Ni esprimas siajn plej sincerajn kondolencojn al k-do Nikola Aleksiev kaj al liaj familianoj. Ni kliniĝas antaŭ la hela memoro de k-ino Stefana Aleksieva.

CE de BEA

Unu rondiro de Sankta Georgo

Sankta Georgo rondiris la kamparon, kiel ĉiujare, kiam venadis la tempo por tio.

Li malrapide marŝis inter la verdaj grenkampoj, kies ondoj estis ankoraŭ ripozantaj en la frumateno. Ĉirkaŭvolvita per densa purpura mantelo, kiu kvazaŭ brulus pro la unuaj sunradioj, li similis movigantan flamon kaj lia ora aŭreolo kovris la sundiskon.

Liaj helaj junaj okuloj similis al smeraldoj kaj en ili speguligis la orkolora verdaĵo, kiun ili ĉirkaŭrigardis ĝis la senfino. Sur lia kaŝtankolora krispa barbo brilis argenta rospolvo.

La animo de la sanktulo ĝojis, ĉar ĉio ĉirkaŭe spiris kaj vivis ĝuste laŭ la granda dia ordono. Birdetoj flugis kaj sin amis en sinforĝeso. La etaĵ bestetoj en la herbo tiel pasie estis fordonintaj sin al la granda forto, per kiu ilin dotis la Kreinto, ke mortis pro senfortiĝo aŭ disŝiris unu la alian pro ekstazo. Parigintaj papilioj flirtis super la verdaj grenspikoj kaj laciginte falis sur la ŝultrojn de la sanktulo. Sur florkovritaj herbejetoj leporoj fordonintaj sin al la inklinado de siaj koroj, ne aŭdis la fremdajn paŝojn kaj la eterna timo antaŭ la morto estis forlasinta ilin. Sur la argentaj aranejoj en la kratagoj sangavide embuskis unu la alian ekscititaj araneaj paroj kaj faris danĝerajn ludojn sur la maldikaj fadenoj. La fruktigitaj arboj zorgeme subtenis siajn ankoraŭ ne maturigintajn idojn, ĝuante la varmon de la sunradioj.

Fordoninta sin al pensoj pri la grandeco de la dia kreaĵo kaj pri la fajra forto de la vivo, Sankta Georgo de tempo al tempo haltigis siajn paŝojn kaj sin turnis por ĉirkaŭrigardi la tutan kamparon. Kaj jen meze de tiu ĉi orsmeralda vazo li vidis du homfigurojn vestitajn hunte kaj gaje, similajn al du grandaj marŝantaj floroj.

ELIN PELIN

Elin Pelin (1877—1949) estas unu el la plej brilaj reprezentantoj de la kritika realismo en la bulgara literaturo, unu el la plej dolĉeparolaj rakontistoj kaj plej grandaj vivamantoj inter la bulgaraj verkistoj-klasikuloj. „Rakonto de la bulgara vilaĝo“, kiel plej ofte lin nomas la esplorantoj de la bulgara literaturo, li prezentas la vivon en la bulgara vilaĝo en ĝiaj realaj konfliktoj, sen utopiaj iluzioj.

La plej signifaj verkoj de Elin Pelin estas de la periodo antaŭ la Balkanaj militoj (1904—1912). Li estas aŭtoro de du noveloj („La familio Gerak“ (1911) kaj „Tero“, de multnombraj rakontoj, de belegaj porinfanaj verkoj, de parodioj kaj humuraĵoj. . .

Inter la verkoj de lia pli malfrua periodo elstaras la novelaro „Sub la monaĥeja villaŭbo“ (1936), prave konsiderata kiel unu el liaj plej maturaj verkoj — prolo de la bulgara prozo. Ĝi estas verko de la aŭtuna saĝo, poezia mediatado pri la senco de la vivo. Rakontante pri diservantoj, pri monaĥoj kaj sanktuloj, Elin Pelin bonhumore, per vivama rideto, miksis kun iom da ĉagreno, senmaskigas la falsajn-hipokritajn normojn de la eklezia moralo. . . La dian saĝon Elin Pelin vidas en toleremo al la homaj malperfektaĵoj, en saĝa kompreno de la logiko de la naturo kaj la vivo. . . En tiu verko kristaliĝis lia epikura rilato al la vivo, ĉerpita el la multjarcenta popola tradicio, fidela al la leĝoj de la amo, kompatemo kaj indulgemo, lia deziro krei religion poeziplenan, unisonan kun la plej kaŝitaj trezoroj de la homa koro.

La ĉi-sube proponata rakonto „Unu rondiro de Sankta Georgo“ estas unu el la plej belaj en la novelaro.

Tiam Sankta Georgo sendis malgrandan raŭpon por surrampi la sveltan korpon de la junulino. La junulino ek-timis. Si akre ekkriis, sed la fortaj manoj de la junulo ne ellasis ŝin. Li etendis la manon por demeti la raŭpon kaj liaj brakoj volviĝis ĉirkaŭ la talio de la junulino.

Ludante tiel, la junulo kaj la junulino ekstaris ĉirkaŭprenite meze de la kamparo. Iliaj okuloj brilis, iliaj animoj senfortiĝis. Ambaŭ tremis, sed ne povis sidigi, ĉar la herbo estis malseka pro la roso.

Kiam Sankta Georgo vidis, ke ili ankoraŭ pli forte ĉirkaŭprenis unu la alian, kiam li aŭdis la plenan doloro kaj ekstazo amkriojn, kiam vidis la alproksimiĝintajn lipojn, li plirapidigis siajn paŝojn, facile preterpasis ilin, sternis sur la roskovrita herbo sian grandan densan purpuran mantelon kaj malaperis.

La junulo kaj la junulino, ĉirkaŭprenite, falis sur la sternojn.

Kaj la suno ekiris sian altan vojon, kaj la kamparo ekrilis per dieca ĝojo.

El la bulgara: Lidia RAEVA



Violin OLJANOV

NOVA AŬRORO

*„Tra densa nebulo...“
Zamenhof*

Estas tempo de lumidealaj,
postsekvas damaĝa epok',
alternas supreniro kaj falo,
ni iras tra dornoj kaj rok'.

Ni omaĝas niajn prafratojn
pro la sindono kaj ard',
ke radiis de l' koroj la batoj
kaj frata am' estis ponard'.

Sed venis jardeka nebulo,
invadis nin cimoj, akrid',
Kaj suĉis la sangon la kulo,
regis estaĵoj por propra profit'.

Sed nebulo levigis, la stelo ekbrilis,
pro l'vento subita forigis feter',
kaj fortojn ekstreĉas de l'stelo la filoj
al sava lumbordo, al nova aŭror'.

Formiĝas denove la rondo amika —
pacbatalantoj sindonaj en front',
diskuras la ratoj en besta paniko,
purigas la vojo al venka estont'.

Maldormu, amikoj, nian movadon
tre karan plugardu en sankta purec',
ke lingvo intera pli dolĉe sonadu
por paco, frateco, progres'!

Januaro 1988

Asen JOSIFOV

AL LA VERDSEZONO

Unua en la verdjarcento dua,
majesta, kalmon promesanta, ĉarma,
vi savas estas pro spirit' malarma,
komuna amo en la vivo plua.

Ho, milde tuŝas nin kareso via,
socle, emocie renoviga,
al bono kreajn fortojn jam instigas
post jubileforumo Varsovia.

En via avidata rega tempo
nun ŝvebe venu vi militvenkanta,
ĉiele, tere, birde, home kanta,
feliĉa, reverdiga Pacprintempo!

Februaro 1988

Venelin MITEV

ARTO POEZIA

„Inspiro“, „harmonio“ kaj „Sublimo“,
„ravigo“, „ĉarma songo“ kaj „senlimo“,
„relevacio dia“, „rara senso
per bildoj esprimadi ĉiun penson“. . .
Ho kiom da difinoj tondraj, pomaj,
tre ofte eĉ suprajaj, ofte trompaj,
donitaj estas al la Poezio
de antikveco ĝis epoko nia!
Difinoj, kiuj igas min protesti.
Ne ĉar eraraj tute ili estas —
ĝis ia grado ŝajne ĉiuj pravas, —
sed ĉar grandegan mankon ili havas:
ne videbligas klare la plej gravan.

Kaj tamen kaŝe mi nun jam esprimas
eĉ ian strangan kontentecon, ke difino
tre ĝusta pri la poezio vere mankas.
Samkiel ne ekzistas pri la Amo ankau.

Kaj mi la historion rememoras
pri Wolfgang Amadeus Mozart.
Aŭskultis iam lin nobeloj sentalentaj
kaj lin komencis flati, komplimenti:
„Pardonu, ke ĉesigis ni okupon vian,
sed ni vin petas, diru la magion
de la verkado. Kiel oni faras
muzikon tiel ĉarman? Diru, kara. . .“
„Mi ja kolektas — li respondis tiam —
la sonojn, kiuj amas sin jam unu la alian!
Ho tiu ĉi soif' nesatigebla
senĉese serĉi por malkovri nepre
la vortojn sorĉajn, esprimantajn ĝuste
la sentojn, kiuj furiozas en la brusto —
kolero, ĝojo, senespero, kontentigo,
malico, amo, maltrankvilo aŭ feliĉo! . .

Vi min demandas nun kun streĉa atendado
pri la sekretoj multaj de l' verkado,
vi petas min pri mia opinio:
ĉu verki aŭ ne verki poezion?
Mi rekte diros: se vi sentas iam
heziton eĉ malgrandan, dubon feblan,
se havas vi eĉ minimuman eblon
ne fari tion ĉi, ne faru ĝin, mi petas.
Ĉar versofari ne signifas, ke poeto
jam oni estas. La verkado vera —
ĝi estas flugo de la pens' libera,
ĝi estas vok' neretenebla de la sango,
ĝi estas ebrigo sorĉa, sankta
de infanaĝo ĝis la lasta spiro,
ĝi estas streb' impeta kaj inspiro
malkovri mem denove ĉiun ajon
kaj ĉiun bildon en la ĉirkaŭaĵo
kaj poste mem diveni ĝian sencon,
kaj poste ĝin rekrei paciencie
samkiel la grajneto en la tero
sub varm' karesa kaj tenero
suĉadas sukojn bonefikajn kaj ekĝermas
kaj kreskas, kreskas, branĉojn sternas,
ekfloras, fruktas — multajn bonajn
grajnetojn malavare donas.
Vi same tiel ĉiujn bildojn, aĵojn
rekreu kun talento kaj kuraĝo
kaj poste ilin redonadu malavare —
pliriĉigitajn jam centoble — al homaro!

ACETU EN LA LIBROVENDEJO DE BEA

BELETRO KAJ POEZIO:

Apostolo de la libereco. Mercia MacDermott. Prezo: 4,26 lv.

Antologio Nuntempa poezio kaj prozo. Prezo: 3.74 lv.

Analizo de la interrilatoj inter la blindularo. José Stark. Prezo: 2,50 lv.

Burgoj kaj kasteloj. Irena Papirnikova. Prezo: 1.85 lv.

Gardu la pacon. Asen Grigorov. Prezo: 2.40 lv.

La glaciokovrita ponto. Ljuban Stanev. Prezo: 2.39 lv.

Esperanto-poetoj de Bulgario. Canko Murgin. Prezo: 0.60 lv.

Rakontoj. Jordan Jovkov. Prezo: 1.85 lv.

Sub la jugo. Ivan Vazov. Prezo: 3.20 lv.

Meze de Eŭropo. Esperantigis: E. Seemannova, O. Knichal, A. Stanura. Prezo: 1.40 lv.

Naŭ jarojn en la infero. N. Kemalov. Prezo: 2.40 lv.

La perdita vizago. Jozef Nesvadba. Prezo: 1.40 lv.

Panoram. Rudolf Hromada. Prezo: 0.80 lv.

Riporto skribita en la pendumila maŝo. Julius Fučík. Prezo: 1.40 lv.

Timur kaj lia taĉmento. Arkadij Gajdar. Prezo: 1.00 lv.

Ukrainaj fabeloj. Nadija Andrianova. Prezo: 1.37 lv.

Poezio. Hristo Botev. Prezo: 0.59 lv.

Vilaĝo Borovo. Krum Velkov. Prezo: 0.79 lv.

Ventolume. Debora Baarandi. Prezo: 0.50 lv.

Kantoj de motoroj. Nikola Vapcarov. Prezo: 1.90 lv.

Beletraj eseoj. Georgi Miĥalkov. Prezo: 0.45 lv.

Mistera lumo. Georgi Miĥalkov. Prezo: 2.70 lv.

Vagante tra la mondo maltrankvila. Nadija Andrianova. Prezo: 3.90 lv.

Oklingva nomaro de eŭropaj birdoj. Dr. Mészáros Béla. Prezo: 2.60 lv.

Kiel verki kaj traduki poemojn. Kalman Kalocsay. Prezo: 0.80 lv.

LERNOLIBROJ

Lernolibro por unua grado. Markov, Válev, Sarafov. Prezo: 0.95 lv.

Lernolibro por dua grado. Violin Oljanov. Prezo: 1.40 lv.

Lernolibro por tria grado. Violin Oljanov. Prezo: 0.85 lv.

Ekzercaro por elementa kurso. Neno Janev. Prezo: 0.65 lv.

La tuta Esperanto. Henrih Seppik. Prezo: 1.35 lv.

Malfacilaj momentoj en Esperanto. Violin Oljanov. Prezo: 0.50 lv.

Margene de la lernolibro. Bernard Golden. Prezo: 2.00 lv.

Programoj kaj regularoj por ekzamenoj. Prezo: 0.65 lv.

VORTAROJ

Esperanto-bulgara vortaro. Asen gorov. Prezo: 0.60 lv.

Bulgara-Esperanta vortaro. Asen Grigorov. Prezo: 0.70 lv.

GRAMOFONDISKOJ

Jubilea koncerto de Veselin Damjanov. Prezo: 2.30 lv.

Kantas Miŝo Zdravev. Prezo: 0.70 lv.

Georgi Miĥalkov. Ni vivos! Prezo: 2.30 lv.

Hristo Gorov. Poemoj.

REVUOJ

Juna amiko, n-roj 1—4/1987 kaj n-ro 1/1988. Hungara eldono. Prezo: 0.60 lv.

ESPERANTAJOJ

Jubilea marko „100 jarojn Esperanto“. Prezo: 0.13 lv.

Insignoj. Prezo: 0.30 kaj 0.40 lv.

Jubileaj kovertoj. Prezo: 0.08 lv.

Portreto de Zamenhof. Prezo: 0.78 lv.

Slosiltleniloj. Prezo: 6.20 lv.

Bildkartoj. Prezo: 0.12 lv.

Afiŝoj. Prezo: 0.32 lv.

Ni povas ekspedi malgrandajn pakojn antaŭpagitajn je la konto de IEK — Ŝtata Sparkaso 3, N-ro 185/5003025, Por pliaj informoj turnu vin al Margarita Atanasova, bul. Hr. Botev 97, poŝtkesto 66, tel. 31-00-29.

Nia sperto

POR FARI NIAN VIVON PLI RIĈA KAJ INTERESA

Jam fariĝis tradicio la iniciato de la Estraro de Esperanto-Societo „Prof. d-ro Asen Zlatarov“ en Ĥaskovo inviti al siaj merkredaj kunvenoj spertajn esperantistojn el la lando, bonajn oratorojn kaj prelegantojn. La postuloj al la prelegantoj estas ne nur perfekte posedi la lingvon, sed ankaŭ scipovi kapti la atenton de la ĉeestantoj, krei viglan kaj aktivan etoson en la kluboj, provoki la partoprenemon de la societaj membroj, inter kiuj estas kiel malnovaj kaj bonaj esperantistoj, tiel ankaŭ nespertaj pri la lingvo novaj membroj. Do tasko nobla, sed ne tre facila, ĉu ne?

La ideo inviti eksterajn prelegantojn naskiĝis ĉe la Estraro dum kunsido, en kiu oni pridiskutis la problemon kiel aktivigi kaj variigi la organizan vivon de la societanoj, fari pli interesaj kaj pli allogaj la ĉiusemajnajn kunvenojn de nia societo.

Jam kelkaj konataj elstaraj esperantistoj akceptis la inviton prelegi kaj gastis al la esperantistoj en Ĥaskovo. En oktobro nia gastino estis Fani Miĥajlova el Plovdiv. Ŝi rakontis interese kiel Esperanto gajnis la konkuradon inter la multaj pretendantoj por internacia lingvo, substrekiĝis ĝiajn avantaĝojn kompare kun kelkaj aliaj seriozaj lingvoprojektoj. La prelego provokis multajn demandojn, al kiuj ŝi kompetente respondis. En la sekva monato gastis Kremona Băceva al Sofio, kun interesa prelego pri ĉiuj lingvoprojektoj post Esperanto. Per abunda ilustrata materialo (lumbildoj kaj tabeloj) ŝi elokvente komparis Esperanton kun Okcidenta, Interlingua, Novial kaj aliaj ĝiaj rivaloj kaj kaptis la atenton de la aŭskultantoj per sia modela lingvaĵo.

Grandan intereson vekis ĉe la esperantistoj el Ĥaskovo la prelego de ing. Kiril Velkov el Vraca. Lia prelego temis pri faktoj kaj elpensadoj lige kun la tiel nomataj „flugantaj teleroj“, ilustrita de dudeko da lumbildoj. Li kaptis la atenton de la ĉeestantoj ne nur per la forto de nekontestablaj argumentoj kaj faktoj,

sed ankaŭ dank' al sia simpla kaj esprimriĉa lingvaĵo kaj perfekta posedo de Esperanto. Abundo da demandoj pruvis, ke la prelego vekis viglan intereson.

En la plano de niaj societaj kunvenoj kiel estontaj prelegantoj estas notitaj multaj spertaj bulgaraj esperantistoj. Sian „deziron gastigi en Ĥaskovo konfirmis Nedka Valjaviĉarska, Georgi Miĥalkov, Neli Abaĝieva k. a.

La gastado de prelegantoj ne estas la sola nova iniciato por variigi la vivon de nia E-societo. Dum la tradicia novjara festo, krom la gaja etoso kreita ĉirkaŭ la kovrita de frandaĵoj mangotablo, en la bele ornamita klubojo por unua fojo estis organizita ŝaka „blicturniro“ inter membroj de la ŝakkluboj ĉe nia societo kaj ĉe la Esperanto-societo en Dimitrovgard, kiuj gastis en Ĥaskovo. La vespero pasis en gaja amika etoso kun multe da kantoj, rido kaj E-babilado. Ĉiuj partoprenantoj konsentis, ke similaj renkontigoj devas esti pli oftaj.

Ofta gasto de la esperantistoj estas ankaŭ la fondita antaŭ du jaroj „Arta Klubo“, kiu organizas kaj gvidas la agadon de ĉiuj, kiuj emas verkii poeziaĵojn kaj prozaĵojn, traduki en kaj el Esperanto, deklami, ludi ktp. Unufoje monate „Arta Klubo“ gastas al la societaj membroj. Krome „Arta Klubo“ disvolvas tre aktivan kreon kaj tradukan laboron. Ĝia estas la merito pri la apero antaŭ du jaroj, en 1986, de la libro „Homo, antaŭeni!“ (tradukitaj en Esperanto poemoj de Penjo Penev). Baldaŭ aperos alia grava libro, verko de la klubanoj — la antologio „Nesto de Birdoj“. Ĝi enhavas poemojn kaj prozaĵojn de diversaj verkistoj kaj poetoj loĝintaj aŭ loĝantaj en Ĥaskovo kaj originalajn verkojn de membroj de la klubo.

Oni povus ankoraŭ multon rakonti pri la estontaj planoj de E-societo „Prof. d-ro Asen Zlatarov“ en Ĥaskovo. Ĝia Estraro, helpate de ĉiuj membroj, klopodas fari la vivon en la propra Esperanto-Domo en la centro de la urbo, (pri kiu la societo disponas jam 8 jarojn), pli interesa kaj riĉa, plialtigi la lingvan nivelon de la membroj, renovigi kaj reorganizi sian tutan agadon laŭ la postuloj de nia tempo.

Ing. Nikola UZUNOV,
prezidanto de Esperanto-Societo
„Prof. d-ro Asen Zlatarov“ — Ĥaskovo

MI SERĈAS GEAMIKOJN EL DIMITROVGRAD

Mi esperantistigis en Dimitrovgard en la jaro 1956/57, kiam en la gimnazio la tuta klaso lernis fakultative la internacian lingvon Esperanto. Ofte ni vizitis la Esperanto-klubon, kie la tiama prezidanto de la societo Vălcan Hristozov kuragiĝis nin. Mi estis agrable surprizita, kiam la prezidanton vizitis gastoj el Britujo, liaj multjaraj korespondantoj. Ili lerte parolis Esperanton.

Poste mia familio transloĝiĝis en Ĉeĥoslovakion, kie mi komencis lerni aliajn lingvojn. Reveninte en mian naskiĝurbon Razgrad, kiel ĉiĉeronino en arkeologia muzeo, vizitante historiajn objektojn, mi renkontis homojn kun verda steleto, parolantajn Esperanton. Denove ekflamis mia malnova amo al Esperanto. Plene konvinkita, ke Esperanto povas esti la „dua lingvo“, mi serioze kaj konstante okupiĝis, por refreŝigi miajn konojn.

Unu tagon oni venis ĉe mi kaj proponis al mi postenon en la nova Distrikta Estraro kun prezidanto d-ro Kirĉev. Tiamaniere komenciĝis mia agado en la E-Movado. Sekvis diversaj naĉaj kaj internaciaj aranĝoj, riĉa kulturprogramo en nia Esperanto-domo de Kulturo. Mi havas korespondantojn, eĉ komencis gvidi kursojn por komencantoj. Kaj ofte pense revenas al la tempo, kiam mi komencis lerni tiun eĉ mirindan lingvon, al mia juneco.

Mi legis en „Bulgara Esperantisto“, ke la societo en Dimitrovgard celebris sian 40-an jubileon. Gratul-

lojn! Foliumante la antologion „Rozo kaj glavo“, mi vidis konatan nomon — de la poetino Vaska Vălĉanova. Mia opinio ŝi estas filino de esperantisto el Dimitrovgard. Tute mi deziras informiĝi, ĉu iuj el miaj iamaj samklasanoj daŭrigas okupiĝi pri la lingvo de Zamenhof. Se jes, ni povus interŝanĝi sperton, vizitojn, rememorojn.

Mi esperas, ke vi rememoros pri mi, karaj geamikoj kaj skribos al mi. Mia adreso estas:

Milena TODOROVA TOCEVA-GEORGIEVA, Razgrad 7200, ul. „Dondukov“ 1, ap. 5.

RENKONTIGOJ EN KATALUNIO

La 17-an de januaro j. k. en la Esperanto-Centro en urbo Sabadell (Hispanujo) okazis solenaĵo, dum kiu Ljubomir Trifonĉovski — membro de CE de BEA, transdonis la oran jubilean medalon de BEA al la ĝenerala sekretario de Kataluna Esperanto-Asocio s-ro Llibert Puig i Gandia pro lia kontribuo al la E-movado.

Dum renkontigo kun la estraro de Kataluna Esperanto-Junularo estis pridiskutita interkonsento pri kunlaboro inter la junularaj E-organizaĵoj de Bulgario kaj Katalunio. La rezulto atingitaĵo dum la pasinta jaro, estas bona bazo por plua fruktodona laboro de ambaŭ organizaĵoj.

La reprezentanton de BEA akceptis s-ro Josep Martínez de Foix — prezidanto de la UNESKO-Klubo en Barcelono, en kies kadroj agadas ankaŭ la katalunaj esperantistoj.

Leteroj de korespondamikoj

FELIĈIGA „KONCERTO“ EL BULGARAJ KANTOJ

Karaj geamikoj,

Antaŭ kelkaj tagoj mi denove aŭskultis la diskon, kiun vi donacis al mi. (Temas pri la gramofondisko de Ĥoro de Instruistinoj-Esperantistinoj el Pazarĝik). En ĝi mi trovis iom de la dolĉa bulgara akcento. En tiu vespero mi estis sola hejme kaj plurfoje aŭskultis la diskon — „ĝissate“. . . Tio instigis min ree aŭskulti ankaŭ aliajn muzikerojn, kiujn mi aparte ŝatas. Tiu mia „koncerto“ — tre feliĉiga, daŭris ĝis noktomezo. . . Jen kio ozas al mi, kiam mi aŭskultas bulgarajn kantojn!

Amike, Annie

Genval, Belgio, 19. 12. 87

(El letero al familio Arnaudov el Pazarĝik)

„MI VOLONTE REVENUS. . .“

La Internacia E-Kursejo (IEK) en Pisanica estas bone konata eksterlande kaj havas sian meritan aŭtoritaton en la vicoj de la monda esperantistaro.

Plena de riĉaj impresoj pri Pisanica estas la letero de mia bona amiko el GDR Ulf Beling.

Post la belaj travivaĵoj en la kongresaj urboj Krakov kaj Varsovio li alvenis Bulgarien en aŭgusto pasintjare, speciale por perfektigi sian lingvoscion en IEK-Pisanica.

Li detale priskribas en interesa letero sian kontentecon pri la laboro en la E-kursejo. Lia opinio estas, ke la instruprogramo estis tre varia kaj la gekursanoj rapide kaj facile eklernis la lecionojn. La multnombraj didaktikaj ludoj helpis al ili „proksimiĝi al la esperanta pensado“.

La ekskursoj al diversaj interesaj lokoj en tiu regiono donis eblecon pli bone ekkoni ĝin. La bivakfaroj kaj la ravaj rodopaj sakŝalmaj melodioj kompletigis la belajn impresojn pri Rodopi-montaro.

Forte impresis Ulf la vizito de la prezidanto de BEA Sava Dălbokov en Pisanica. Lia parolado pri la laboro de BEA, lia intereso al la demandoj kaj problemoj de la ĝelernantoj estas ankoraŭ unu signo de la zorgoj de la BEA-estraro kaj ankaŭ de la ŝtataj instancoj por divastigo de Esperanto en Bulgario.

Dum sia 2-taga restado en Sofio Ulf Beling vizitis multajn muzeojn kaj aliajn vidindaĵojn de nia ĉefurbo. Li jene daŭrigas sian leteron: „Mi estis ravita de la beleco de via ĉefurbo kaj de la sincereco kaj afableco de la bulgaroj. Mi volonte revenus Bulgarien. . .“

Antoaneta NIKOLAEVA

KULTURA KUNLABORO SERĈATA

Samarkand-regiona Filio de Sovetia Fondaĵo de Kulturo serĉas seriozajn kaj daŭrajn kontaktojn kun diverslandaj kulturaj fondaĵoj kaj organizoj kaj ties lokaj filioj cele al faka korespondado, kultura interŝanĝo ktp. Por internaciaj kontaktoj ni uzas diversajn lingvojn i.a. ankaŭ Esperanton. Ĉiulandaj E-aktivuloj estas petataj laŭeble aperigi ĉi-takston en nacilingvaj kulturaj periodaĵoj.

SAMARKAND REGIONAL BRANCH OF SOVIET CULTURE FUND, 70300 SAMARKAND, Lenin Square, Uzbekistan USSR

SUKCESA PARTOPRENO

En februaro j. k. reprezenta belarta kolekto de lernantoj-esperantistoj ĉe E-societo „Trifon Hristovski“ — Botevgrad, tre sukcese partoprenis la Tutpolandan konkurson de E-poezio, kantoj kaj afiŝoj, laŭ invito de la lernejo-organizanto el Bydgoszcz.

Per la I premio por afiŝo estis distingita Saša Marinova el lernejo „Prof. d-ro Asen Zlatarov“.

Kuraĝigan premion por afiŝo kaj por partopreno en la konkurso de deklamado (deklamkonkurso) ricevis Veselka Veliĉkova el lernejo „Vasil Levski“. Pro sukcesa sinprezento en la deklamkonkurso estis premiita Iva Marinova, lernantino en lernejo „Prof. d-ro Asen Zlatarov“.

Gvidantoj kaj partoprenantoj ricevis diplomojn, kaj la ensemblo estis distingita per kristala pokalo.

Daniela JOSEVA,
belarta gvidanto de la lernanta
ensemblo el Botevgrad

NOVA POSTMARKO



La Asocio „Komunikado“ (PR Bulgario) emstios dum la sekvontaj monatoj specialan poŝtmarkon dediĉitan al la 125-a datreveno de la fondaĵo de Internacia Ruĝa Kruco kaj Ruĝa Duonluno. Pentristo: Dimităr Tasev. Valoro — 13 stotinkoj, formato — 25×40 mm, papero blanka, gumita 100%-e—celuloza. Tekniko—profunda kupra preso.

La poŝtmarkon oni presos en la ŝtata presejo de la Komunikado. Eldonkvanto— 300 000 ekz.

Draguŝko PETROV



ZAMENHOF- TAGOJ'87 EN SOVETUNIO

La arango estis organizita de la E-klubo en urbo Kaunas (Litovio) kaj allogis 260 esperantistojn el 7 respublikoj de USSR. En ĉi urbo loĝis L. Zamenhof. Do ni ĉiam kun ĝojo kaj estimo vizitas la stratojn, kiujn li vizitis, kie li loĝis. . .

SvetlanaPAGORELAJA, Kievo

ESPERANTO EN MINERALNI BANI

Por unua fojo en kuraĵloko Mineralni bani, departemento de Ĥaskovo, estis organizita kurso de Esperanto, kiu funkciis en la Ekonomia Teknikumo.

La partoprenantoj en la kurso laboras fervore kaj diligente, ĉar ili deziras korespondi kun geamikoj el alilando. La unua feliĉa kursanino, kiu ricevis leteron el Latvio estis Ivanka Teneva el II-a kurso.

En la kunveno estis fondita Esperantista societo „Amikeco“. Ĝia prezidanto estis elektita la lernantino Dimitria Mitreva kaj sekretario Ivanka Teneva. Dum sia konkluda parolado la vicedirektoro Ruska Milkova sin turnis al la junaj esperantistoj kun varmaj vortoj. Si substrekiis, ke Esperanto estas kultura akiraĵo kaj larĝa fenestro al la mondo. Si finis sian paroladon kun la vortoj: „Sukceson, junaj esperantistoj!“

Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto estis inaŭgurita ekspozicio de esperantaj revuoj el multaj landoj.

Ni esprimas nian dankon al Ĉanko Cvetilov kaj lia kunlaborantino Jeljazka Dimitrova kaj d-ino Ruska Milkova pro la granda helpo, kiun ili donis al ni por la kurso. Per ilia helpo ni metis la komencon por lernado de Esperanto en kuraĵloko Mineralni bani.

Penjo STOJANOV,
Ĥaskovo



LA III PREMIO DE RADIO PEKINO POR ANTOANETA NIKOLAEVA

La nova 1988 — „la jaro de la drako“ laŭ la orientlanda kalendaro, komenciĝis per agrabla surprizo por nia samideanino Antoaneta Nikolaeva el u. Opaka, distrikto de Razgrad, membro de E-societo „Homeco“ en urbo Popovo kaj gvidantino de E-klaso en v. Dobrotica, komunumo de Antonovo. Si gajnis la 3-an premion en la internacia konkurso „Mi kaj Radio Pekino“ okaze de ĝia 40-a datreveno.

Komence de novembro 1987 ŝi ricevis dankleteron kaj memorkoverton de la Esperanto-sekcio de Radio Pekino pro ŝia partopreno en la konkurso. Kaj en la unua semajno de januaro k. j. ŝin atingis pakajo enhavanta honoran premio-ateston, belan bluzon kun la emblemo de Radio Pekino, interesan sakon ornamitan per scenoj el la ĉina mitologio, flageton, memorkoverton kaj insignon pri la 40-a datreveno de Radio Pekino kaj n-ro 1/1988 de revuo „El popola Ĉinio“ Sekvis ankaŭ gratulletero pro ŝia sukcesa partopreno en la konkurso.

Nedjalka STANEVA



ESPERANTO KAJ KOMPUTILOJ

Ili aperis antaŭ iom pli ol kvardek jaroj. Grandegaj monstroj, kies pezo superis 200 tunojn, la unuaj komputiloj per siaj kelkmiloj da elektrotuboj sukcesis sufiĉe rapide solvi matematikajn taskojn. Ili simbolis la scienc-teknikan progreson kaj ĉiu ŝtato fieris, se ĝi posedis similan unikan aparaton. Certe nenie la progreso estas tiel rimarkebla, kiel ĉe la komputiloj. Nuntempe ili estas sufiĉe malgrandaj, la prezoj tiom malkreskis, ke multaj privatuloj posedas ilin. La novaj komputiloj kalkulas kaj desegnas, parolas kaj kantas, instruas kaj ludas. Ili farigis parto de nia ĉiutageco. Estas registrita interesa fakto: tasko, kiun komputilo solvis en la kvardekaj jaroj dum pli ol 10 horoj, komence de la sepdekaj jam bezonis nur parton de sekundo. Do la rapideco kreskis, kaj ties storo (la memoro) povas konservi centmilojn kaj milionojn da datumoj.

Cu la komputiloj povas uzi ankaŭ Esperanton, ĉu ili povas servi al la esperantistoj? Certe, jes. En ĉi tiu artikolo ni koncize indikos la eblajn sferojn de ties apliko.

Unue, eblas perfekte kompili kaj redakti tekstojn. La ĉefa problemoj estas la supersignoj, kiuj mankas ĉe la normalaj komputiloj, sed helpe de specialaj programoj oni povas fari iun ajn literon aŭ signon. Ĝi povas aperi sur la ekrano, aŭ esti uzata de la printilo — aparato, kiu tajpas sur papero. Finfine, laŭ la nun preskaŭ forgesita Zamenhof-rekomendo, eblas uzi la duoblajn literojn *ch, sh ktp.* La ekzistantaj redakto-problemoj permesas tajpi tekstojn, anstataŭigi iujn vortojn per aliaj, forigi aŭ enmeti fragmentojn — kaj poste ĉion printi kun rapideco 100-200 (kaj pli da signoj) po sekundo. Ĉu iu tajpisto povus konkuri?

Due, komputiloj kaj instruado de fremdaj lingvoj. Ekzistas multaj instruprogramoj en aliaj lingvoj, ankaŭ kelkaj en Esperanto. La lernantoj devas enmeti

mankantajn vortojn en frazojn, ĝuste uzi afiksojn kaj finaĵojn, respondi diversajn demandojn. La programoj povas montri bildojn (Eĉ kun moviĝantaj figuroj), kiujn oni devas priskribi. Ekzistas programoj parolantaj. Per la klavoj oni tajpas tekstojn kaj la komputilo ĝin prononcas (fakte ne tre klare kaj bone, sed tio estas nur komenco).

Kaj fine, la plej interesa sfero estas la tradukado. Similaj eksperimentoj estis farataj antaŭ tridek jaroj kun aliaj lingvoj, tamen nur en la lasta jardeko tiu problemoj estas traktata serioze. La tasko estas tre malfacila. La komputilo devas „memori“ multajn vortojn, gramatikajn regulojn, specialajn termojn. Krome, devas esti farita speciala programo por analizi la vortojn kaj la tekstojn. Esperanto havas tre simplan gramatikon, nelimitajn eblecojn pri vortkonstruo, liberan ordon de la vortoj. Por la homo tio estas faciligo, por la aparato — ne. La komputilo devas kompreni ekzemple la diferencon inter „kolego“ kaj „kolago“, devas scii, ke „kaj“ ne estas adjektivo en pluralo ktp.

En la jaro 1982 naskiĝis la projekto DLT (Distribuita Lingvo-tradukado), plenumata en Nederlando. Ĝi celas kreon de multaj dulingvaj tradukoprogramoj, kiuj uzos Esperanton kiel „pontolingvon“. Antaŭnelonge (revuo „Esperanto“, marto 1988) estis anoncote pri la unuaj realaj rezultoj. „Temas pri traduko de plenaj anglalingvaj frazoj, ne-antaŭkonitaj, sed faritaj per limigita vortostoko, en samsencajn francajn frazojn... la sistemo DLT povos solvi tiun problemon de la internacia komunikado, kiun ĝi elektis por si: la interŝanĝon de informoj per komputilaj retoj.

Kiril VELKOV,
kandidato de teknikaj sciencoj

TIBOR SEKELJ

Kumeŭaŭa la filo de la ĝangalo

(Daŭrigo de n-ro 11/1987)

SURPRIZO EN LA AKVO

Dum ni sidis ripozante en nia pirogo, alvenis al mi la ideo, ke estus bone ke ankaŭ mi provu la sorton koncerne la fiŝkaptadon. Tuj mi diris al Kumeŭaŭa, ke li sidigu sur la poŭpon por direkti la pirogon, kaj mi ekstaris sur la pruo. Kompreneble mi deziris hapti iun grandan fiŝon, kaj pro tio mi prenis en la manon la harpunon.

Komence estis al mi malfacile konservi la ekvilibron starante sur la pruo de la balanciganta boato, kaj en du aŭ tri okazoj mi preskaŭ falis en la akvon. Fine tamen mi alkitimigis al la nestabila situacio sufiĉe por kuraĝi lanci la harpunon. Tiam mi komencis serĉi mian viktimon sub la akvo. Ĉiu

ombro, ĉiu subakva trunko aŭ roko ŝajnis fiŝego al miaj nelertaj okuloj. La ondaj movoj de la akvo kaj la distordigo de la radioj sub la akvo petole ludadis kun mia imago.

Post longa tempo mi subite ekvidis ion, pri kio mi ĵurus, ke ĝi estas fiŝo. Jes, nun mi estas tute certa. Sed ĝi volas eskapi maldekstren. Mi ekscitite signalas al la knabo, ke li direktu la pirogon tiuf flanken. Nun ŝajnas, ke ni tuj atingos ĝin. Jen ĝi estas, preskaŭ sub ni! Mi etendas la dekstran brakon kun la harpuno, streĉas ĉiujn muskolojn de mia korpo, kaj per mia tuta forto enĵetas la armilon en la akvon. Sammomente mi kaptas la ŝnuron, per kiu la harpuno estas ligita, por ke ĝi ne eskapu.

Klare mi vidis kiam la pinto de la harpuno penetris en la fiŝegon, kiu, laŭ mia opinio, estis du metrojn longa. Sed en la sama momento,

kiam tio okazis, mi sentis elektran ŝokon tiom fortan, ke falis en la fundon de la pirogo, kvazaŭ mi estus ricevinta bategon sur la kapon. Dum mi ankoraŭ tremis pro la ŝoko kaj la emocio, mia kunulo laŭte ekridegis, kun la manoj sur la ventro.

— Ĉu Njikuĉap ne scii, kio esti elektra angilo? Kumeŭaŭa tuj vidis, sed ne volis diri. Plej bone lerni per propra sperto. Tion neniam plu forgesi.

— Malica knabo vi estas, Kumeŭaŭa. Vi povis esti avertinta min.

Tuj li ekprenis la ŝnuron kaj komencis tiri ĝin. Iom post iom aperis sur la surfaco de la akvo la harpuno, kaj sur ĝia pinto la longa kaj mallarga korpo de la angilo. Fakte ĝi estis du metrojn longa.

Kiam mi vidis la scenon, mi demandis:

— Diru, Uaŭa, kiel vin ne ŝokas la kurento, kiu al mi donis tian fortan baton, kiam ankaŭ vi tenas la saman malsekan ŝnuron, kiun mi tenis?

— Jes, sed la kompatinda fiŝo elspezis sian tutan elektron por Njikuĉap, kaj nenio restis por Kumeŭaŭa! — diris ridante la knabo.

Ni ambaŭ pene sukcesis entiri la fiŝegon en la pirogon, ĉar ĝi luktis, klopodante savi sin el niaj manoj, aŭ almenaŭ renversi la pl-

100 tagojn en Bulgario

DANG DINH DAM,
Sekretario de VPEA

La ĉi-supra cifero 100 estas signifoplena kaj aparte memorinda por mi kaj mia juna kolego, kiuj pasigis proksimume cent tagojn en la „Lando de rozoj“.

Nia vizito en Bulgario okaze de la centjarigo de Esperanto (de la 3-a de majo ĝis la 6-a de aŭgusto 1987) estas nova frukto kaj modelo de la frataj kaj tradiciaj rilatoj dum 30 jaroj inter Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) kaj Bulgara Esperantista Asocio (BEA).

La akiraĵoj de BEA dum la pasintaj 80 jaroj estas fiero ne nur por la bulgaraj esperantistoj, sed ankaŭ por la tutmonda esperantistaro.

Mi volas resumi kelkajn ĉefajn interrilatojn de BEA kaj VPEA, kies fundamento estis firme starigita surbaze de la principoj de internaciismo.

VPEA estas fondita la 9-an de decembro 1956, nur du jarojn post la granda venko ĉe Djen Bjen Fu super la koloniistoj, en la ĝoja atmosfero de la duonlanda liberigo kun nova reĝimo de Vjetnama Demokratia Respubliko. La Estraro de VPEA ĉe-kape kun ties prezidanto Nguyen Van Kinh, konsistas el aktivaj esperantistoj. En tiu jaro VPEA ankaŭ aliĝis al Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kies estigo en 1953 montrigis kiel grava faktoro por la Esperanto-agado en iuj popoldemokratiaj landoj.

Menciindas, ke ĝuste antaŭ tridek jaroj, en 1957, kiam nia respektata prezidanto Ho Chi Minh faris, la unuan fojon, amikan viziton al frata socialisma Bulgario, unu el liaj akompanantoj estis k-do Nguyen Van Kinh, ambasadoro de VDR¹ en Moskvo, prezidanto de VPEA. Tiu lasta havis bonan okazon renkonti kun bulgaraj esperantistoj, kaj metis firman bazon por la frata amikeco inter VPEA kaj BEA. Li

estis la unua vjetnama esperantisto, kiu propraokule vidis kaj admiris la multflankajn atingojn de la bulgara E-movado, kaj nomis ĝin „Bastiono de esperanto“. Post tiu historia evento, la subtenado de BEA al VPEA ĉiam pli bone efikas. Krom aliaj esperantaĵoj, la granda kvanto da ekzempleroj de „Nuntempa Bulgario“ — belega frukto de la klopodoj de la bulgaraj esperantistoj — estis sendataj al nia fora lando, kaj tiu iama vera perlo inter esperantaj revuoj ĉiam rezervis lokon por publikigi la E-informojn el Vjetnamio, kie la Esperanto-movado ekfloradis kun diversaj aktivecoj abundaj de kursoj, kunvenoj, ekspozicioj...

Citio estis premiso por starigi firman verdan ponton, kiu interligas Hanojn kun Sofio, por ke la esperantistoj de ambaŭ landoj povu (kvankam ĉiam ankoraŭ malofte) rekte renkontiĝi, interŝanĝi spertojn en iliaj E-agadoj por paco, amikeco kaj kunlaboro.

La historio de la vjetnama Esperanto-movado ligiĝas kun ĉiuj etapoj de evoluo de la vjetnama popolo, de ĝia batalo kontraŭ la agresantoj kaj aliaj reakcioj, kaj en siaj unuaj jaroj agnoskis la valoran kaj efikan internacian subtenon kaj helpojn.

Mi bone rememoras, ke en 1958 por la plivigligo de la vjetnama E-movado kontribuis d-ro Todor Todorov, bulgara esperantisto, unu el la internaciaj volontuloj venintaj por helpi la rekonstruon de nia lando. Li modeste diris, ke li ne estas perfekta esperantisto, sed li provis utiligi Esperanton en sia laboro, instruis ĝin al sia vjetnama kolego kaj kune kun tiu lasta uzis la Internacian Lingvon en ilia medicina medio.

Mi konatigis kun Esperanto en tiu periodo de tutpopola krea entuziasmo. Mi eklernis ĝin en vesperaj kursoj. Iom post iom — laŭgrade mi ekregis Esperan-



rogon. Fine, tie ĝi kuŝis antaŭ ni. Mi estis vere fiero pro tiu mia kaptitaĵo, kaj mi estis eĉ preta forgesi la hontigan falon, kiun mi estis suferinta pro ĝi. Al ĉiuj miaj amikoj mi rakontis kiel grandan fiŝon mi kaptis.

Dum pri tio mi pensis, mi klopodis eltiri la feran pinton de la harpuno el la sanganta vundo de la fiŝo, tiel ke mi laŭeble ne multe turmentu ĝin. Fine mi tion sukcesis fari. Sed en la sama momento la besto kurbigis, skurgis min per

sia vosto kvazaŭ per vipo kaj saltis trans la malaltan randon de la pirogo. Mi rapide klinis min super la akvon kaj etendis la manon por denove kapti la angilon. Sed la eta indiano per unu salto, alproksimigis al mi, kaj per subita movo retenis mian manon.

— Piranĵoj tuj venas. Dangere enmeti manon en akvon!

Fakte, nur malmultaj sekundoj pasis, kiam dekoj da piranĵoj aperis, kaj ilia nombro rapide kreskis al centoj. Jam mi estis aŭdinta pri ili, sed nun mi bone povis ilin observi. La piranĵoj estas fiŝoj nur iom pli grandaj ol la manplato de homo. Ilia buŝo estas malgranda, sed en ĝi troviĝas du vicoj da triangulaj kaj tre akraj dentoj kiuj, kvazaŭ du segiloj, perfekte koincidas unu kun la alia. La piranĵo tuj sentas la proksimecon de sango, ĉu pro laodoro ĉu pro la koloro. Ĝi alnagas rapide kiel sago por preni nur unu buŝplenon de la viktimo, ĉu besto aŭ homo.

Kaj tiel nun alkuris centoj da piranĵoj por elmordi nur po peceton de mia fiŝo, kaj ili faris tion tiel rapide, kvazaŭ ili veludus por iu premio. Kelkaj el ili en la vervo elsaltis el la akvo por sursalti sur la viktimon. Pro la svarmanta amaso da fiŝoj la akvo ŝajnis esti bolanta. Sed tiu ĉi terura sceno ne

ton kaj fariĝis aktiva membro de VPEA. Mi naskiĝis en 1935, do, la kvindekaj jaroj estas la periodo de mia esperplena juneco. Mi spertis la rezistadon kontraŭ la kolonismo kaj la sorto puŝadis min en amaron kaj vagadon. Mi kaptis Esperanton kiel utilan ilon por mia laboro kaj por mia vivo. Kiel kadrolo de VPEA ekde 1964, mi havis bonan okazon labori, studi kaj sekvadi la tutmondan Esperanto-movadon en ĝiaj ĉiuf flankaj agadoj.

La periodo de 1956 ĝis 1966 estis tre fruktodona por la vjetnama E-movado, kiu registris multajn sukcesojn kaj atingojn. Dum tiuj unuaj dek jaroj VPEA kunlaboris kun la Hanoj Fremdlingva Eldonejo, aperigis pli ol 30 Esperantajn librojn. VPEA eldonis ankaŭ lernolibron de Esperanto kaj Esperanto-Vjetnaman vortaron, responde al la bezonoj de la kreskanta nombro de lernantoj, pli ol dumil personoj el diversaj popoltavoloj. Plejparte ili estis intelektuloj, oficistoj, studentoj. Tio estis solida bazo por la aktivado de VPEA en tiu rimarkinda periodo.

Paralele kun la popularigo de la Internacia Lingvo, la taskoj de VPEA identigas kun tiuj de la tuta Vjetnama popolo t. e. lukto por realigo de la Genevaj Interkonsentoj de 1954 cele reunuigi la patrolandon.

VPEA koncentrigis siajn fortojn por eldoni plurajn numerojn de devus „Paco“, de „Informoj el Vjetnamio“ kaj de pli ol 40 titoloj de ĉiuspecaj Esperanto-libroj. Per sia aktiva agado VPEA gajnis la simpatian kaj subtenon de la monda publiko (esperantista kaj neesperantista), speciale en la socialismaj landoj. La helpo kaj subtenado de la internacia esperantistaro al Vjetnamio ĝenerale kaj al VPEA aparte estas tre granda kaj valorega.

¹⁾ VDR — Vjetnama Demokratia Respubliko — *Not. de la Red.*

En 1958 BEA por unua fojo gastigis vjetnaman reprezentanton en sia 33-a kongreso kaj poste multfoje kreis favorajn kondiĉojn por vjetnamaj delegitaroj ĉeesti en la landaj kaj internaciaj Esperanto-konferencoj.

La invito de BEA, ke dupersona delegacio de VPEA partoprenu la 63-an UK de Esperanto kaj la 8-an MEM-konferencojn okazigitan en Varna en 1978, estis nova bona gesto por subteni la rekonitan internacian prestiĝon de Esperanta organizaĵo en Vjetnamio, aserti la neceson de ĝia ekzistado kaj aktivado enlanda kaj eksterlanda.

La partopreno de VPEA-delegacio ĉe-kape kun Nguyen Van Kinh en la 12-a konsultigo de la Esperantaj organizaĵoj en socialismaj landoj en Viŝegrado (Hungario) en 1979, malfermis novan etapon atendatan de ĉiuj bonaj geamikoj de la vjetnamaj esperantistoj. La partoprenintoj de SLEOJ (ASE, BEA, CEA, SEA, GDREA, HEA, PEA, VPEA), kaj la hungaraj esperantistoj ĝoje bonvenigis nin kiel fratojn, kiuj revenis hejmen post longjara disiĝo.

La sinsekvaj partoprenoj de VPEA-delegacioj en diversaj E-aranĝoj estas ŝuldataj al la malavara helpo flanke de niaj frataj socialismaj Esperanto-asocioj.

Antaŭ ol dividi miajn impresojn, travivaĵojn kaj emociplenajn renkontiĝojn dum nia trimonata restado en Bulgario, mi sentis min devigita koncize konigi al la legantoj de „BE“ pri la historio de Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio. Nun mi revenas al tiu feliĉa por mi vivperiodo, kiam laŭ invito de BEA por perfektigo de kadroloj de VPEA, mi kaj mia juna kolego Nguyen Nhu alvenis en la belan landon de Vasil Levski, de Hristo Botev, de Georgi Dimitrov. . . akiri novajn spertojn de niaj bulgaraj amikoj-esperantistoj.

(Daŭrigo en n-ro 6/88)

daŭris pli ol unu minuton. Tiam la akvo denove trankviliĝis. Sur ĝia surfaco floris nur la longa skeleto de la fiŝo, tute blanke purigita de ĉiu viando.

— Dankon, Uaŭa, ke vi tiel lerte malhelpis al mi enmeti la manon en la akvon. Mi ne ŝatus sperti similan atakon de piranĵoj sur mia brako.

— La maljuna indiano Maloa diras: „En la akvo gardu vin de la piranĵoj, kaj de flatemulo sur akvo kaj sur tero!“

Ankoraŭ dum longa tempo mi pensis pri tio, kiel multaj danĝeroj ekzistas en la praarbaro, kaj kiel sur ĉiu paŝo povas pereĝi homo kiu ne konas ilin, dum la indiĝenoj ekde infanaĝo al kutimis defendi sin kontraŭ ili.

— Ni reiri, — diris subite la knabo. — La suno jam alta, kaj viaj amikoj devus esti jam malsataj.

Ni ekpaelis kontraŭ la fluo de la akvo kaj progresis sufiĉe pene. Ni devis konstante padeli ĉar, se ni nur unu minuton restus trankvilaj, la fluo reportus nin tiam, kion ni antaŭe progresis dum dek minutoj.

Tiel ni baldaŭ alvenis al la kaskado, tra kiu la juna indiano nin tiel lerte gvidis. Nun mi scivolis, kiel li faros tion kontraŭ la fluo.

Jam ni klare aŭdis la bruegon de la ondoj, kiuj rompiĝadis kontraŭ la rokoj. La remado fariĝis eĉ pli

malfacila ol antaŭe. Subite mia kamarado diris:

— Ni devl elŝipiĝi. Treni la pirogon tra la kaskado.

Tiel ni faris. Ni ekmarŝis laŭ la riverbordo, trenante la pirogon per ŝnurego. Malrapide ni progresadis. En certa loko la plata, sabla riverbordo mallarĝiĝis kaj malaperis. La akvo estis limigita per densa kreskajaro. Ni devis eniri la akvon. Nun la knabo iris antaŭe trenante post si la pirogon, dum mi de malantaŭe puŝadis ĝin.

Mi rimarkis, ke la indiano tiras nur per unu mano. Per la alia li tenas sian maĉeton kaj per ĝi konstante ion serĉas sur la fundo de la rivero. Mi ne sciis ĉu li tie perdis ion, aŭ eble temis pri iu superŝtiko. Mi decidis demandi lin pri tio, tuj kiam ni eliros el tiu infera bruego.

Jam ni estis proksime al la fino de la kaskado, kiam Kumeŭaŭa levis super la kapon la maĉeton, por montri ion, kion li per ĝi kaptis. Sur la maĉeto troviĝis trapikita stranga fiŝo, pri kiu mi poste eksciis, ke ĝi nomiĝas rajo. Ĝi estas plata, granda kiel telero, rozkolora, preskaŭ travidebla. Malantaŭe ĝi havas longan kaj maldikan voston provizitan per malmola osta pinto. Kvankam la fiŝo mem estis senmova, ĝia vosto kurbigadis kaj ŝvingadis tra la aero, senespeze serĉante sian kaptinton por lin piki.

Kiam ni jam estis iom for de la kaskado, tiel ke ni povis interparoli sen la bruego de la akvo, la knabo klarigis al mi kelkajn aferojn pri la vivo de tiu stranga fiŝo.

Ĝi vivas en la malprofundaj partoj de la rivero, kie ĝi sin kaŝas sub la sablo aŭ la koto. Tiel ĝi kuŝas trankvile, aŭ malrapide nagas, serĉante al si nutraĵojn. Se io aŭ iu ĝin atakas aŭ surpaŝas, ĝi rapide kurbigas la voston kaj per sia osta pinto pikas tiun, kiu ĝin atakis aŭ eble surtretis. Tra la vospinto ĝi ellasas venenon, kiu eĉ al homo kaŭzas fortan doloron, kvankam tio ne estas mortiga.

Mi eksciis ankaŭ ke en la maroj vivas rajoj tiel grandaj, ke ili povas involvi per sia korpo homon, kvazaŭ per lituko, sed iliaj pikoĵoj ne estas venenaj.

Kiam mi vidis la fiŝon, mi komprenis kial Uaŭa ĉiam ion serĉadis per la maĉeton en la akvo. Sen tio li verŝajne surtretus la rajon kaj ricevus ĝian dolorigan pikon.

Ankoraŭ du horojn ni remis. Fine ni ekvidis nian ŝipeton, kiu ankoraŭ elstaris el la akvo, kiel frumatene, kiam ni forlasis ĝin.

La suno estis precize super niaj kapoj. Estis tagmezo. Niaj kamaradoj el la subakviginta ŝipo kun ĝojkrioj akceptis nin. Ili estis jam tre malsataj.

(Daŭrigo en n-ro 7-8/1988)



AUSTRALIO. „Esperanto — lingvo por internacia juro“ estis la temo de referaĵo prezentita ĉe la 8-a Monda Konferenco de Aplika Lingvistiko en Sidnejo (aŭgusto 1987) de Ralph Harry, eksa aŭstralia diplomato.

BRITIO. En oktobro pasintjare aperis la unua numero de nova Esperanto-revuo „Historiaj Studoj“ kiel organo de la novfondita Societo por Studoj pri la Historio de Esperanto. La societo fondiĝis en Britio, sed ĝi estas internacia: membroj el ĉiuj landoj (kontraŭ pago de la jarkotizo por 1988) kaj kontribuantoj por la revuo estas bonvenaj.

Por informoj turnu vin al: Hilary Chapman, 8 Vardre View Pentywyn Rd., Deganwy, Conwy, Gwynedd, LL31 9TE, Gr. Britio. Kontribuantojn por la revuo sendu al la redaktoro KM. Hall, 37, Granville Court, Oxford, OX3 OHS.

FRANCIO. Unu fako de la Universitato Lill III organizis por studentoj kaj por civitanoj kursojn pri Esperanto kaj 15 aliaj lingvoj.

● La PTT Esperanto-Asocio (IPTEA — Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio) B. P. 126, F-05004 Gap-Gedex, celas eldoni meze de 1988 „Tutmondan adresaron de esperantistoj“.

Por senpage registri vian adreson, vi devas skribi ĝin sur speciala karto mendebla ĉe la supra adreso.

● En 1988 francaj enciklopedioj kaj similaj verkoj dediĉas artikolojn al Esperanto, i. a. „Géant“ (80 linioj), „Quid“ (70 linioj), „Neudin“ (18 linioj), „Guinness“, libro de la rekordoj (nur 8 linioj).

● En decembro 1987 la franca filatela revuo „Timbroscopie“ (n-ro 42) dediĉis al Esperanto-poŝtmarkoj multajn kolorfotojn kaj 4-paĝan studon de P. Salanne. Adreso de la redakcio: „Timbroscopie“, 33 rue de Chazelles, F-75017 Paris.

GDR. La 25-an de septembro 1987 en Wehlen estis inaŭgurita memortabulo kun reliefo de Zamenhof kaj la vortoj (germanlingve): „D-ro L. L. Zamenhof (1895—1917) parolis ĉi tie en 1908 al la partoprenantoj en la 4-a Universala Kongreso de Esperanto. Esperanto 1887—1987. Ĉirkaŭ 250 germanaj, ĉeĥaj kaj polaj geesperantistoj partoprenis en la ceremonio, post kio oni guis kulturalan feston.“

IRANO. La 1-an de decembro 1987 vespere la tuta landa kanalo de la Irana Televido anoncis pri la nova eldono de la 712-paĝa libro de la Robaĵoj de la granda persa poeto Kajamo, emfazante nur la Esperantan parton. Dum tri minutoj la kameraoj fokusigis sur la foto de prof. G. Waringhien, tradukinto de la Robaĵoj, kaj sur la emblemo de la Centjara Jubileo de Esperanto. La parolanto, s-ro Halesi, mem estas esperantisto. La programo vekis grandan intereson.

KANADO. „Por estontaj generacioj“ estas la titolo de alloga informilo pri ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiu aperis dank' al la subvencio de la Eduka Fondaĵo Carson en Kanado.

POLLANDO. Dum sia kunsido la 25-an de oktobro 1987 la Ĉefa Konsilantaro de Pola Esperanto-Asocio elektis sia prezidanto Roman Malinowski, la prezidanton de la Pola Parlamento (Sejmo). Malinowski, kiu estis la Alta Protektanto de la Jubilea Kongreso en Varsovio, entuziasmiĝis tiom pri Esperanto, ke aliĝis formale al la movado kaj konsentis kandidatiĝi je tiu posteno.

Kiel deklaris Malinowski mem, li ne intencas esti formala prezidanto, sed deziras malgraŭ sia eksterordinara okupiteco efektive gvidi la laborojn de la Ĉefa Konsilantaro de PEA.

● La bjalistoka ĵurnalo „Kurier Podlaski“ estas verŝajne la sola gazeto en la mondo, kiu de 1987 ĉiutage informas pri Esperanto. Bedaŭrinde, la aŭtoro de la informoj red. Stanisław Dobrowolski, ne havas je sia dispono sufiĉe da materialoj. Do ĉiuspecaj revuoj ktp. estas bonvenaj. Adreso: „Kurier Podlaski“, ul. Wesołowskiego 4, PL-15-000 Białystok, Pollando.

USONO. La revuo „Marine Geodesy“ (Mara Geodezio), vol. 7 n-ro 1—4 2/87 p. aperigis artikolon pri scienca komunikado kaj Esperanto.

USSR. La Litova Filio de ASE havas projekton pri utiligo de la domo de A. Zilbernik (sur la foto), la bopatro de Zamenhof, post antaŭstaranta riparo, por la bezonoj de esperantistoj. Oni planas fondi tie respublikan Esperanto-centron kun jenaj fakoj: 1. Muzeo de Zamenhof kaj de la litova Esperanto-movado. 2. Litova Esperanto-arkivo 3. Esperanto-biblioteko. 4. ĉambroj por Esperanto-instruado 5. ejoj por la urbaj Esperanto-klubo 6. sidejo de la Litova Filio de ASE.

La projekton oni prezentis al la urbaj kaj respublikaj aŭtoritatoj. Jam nun oni havas sufiĉe da materialo por plenigi la tutan trietaĝan domon. La riparado komenciĝos ĉi-jare.





INTERLINGVISTIKA KONFERENCO

Internacian Interlingvistikan Konferencon pri temo „Struktura kaj soci-lingvistika esploro de Esperanto“ (15-a-17-a de aŭgusto 1988, en Budapeŝto, Hungario), organizas la Esperanto-Fako de la Budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd.

Temoj de la konferenco:

- a) La esploro de la unuopaj niveloj de Esperanto (fonetiko, fonologio, morfologio, sintakso, semantiko);
 - b) Leksikologio, leksikografio, terminologio en Esperanto;
 - c) Area kaj tipologia analizo de internaciaj lingvoj;
 - d) Soci-lingvistikaj aspektoj de internaciaj lingvoj, lingvopolitiko;
 - e) Tipologio de lingvaj ŝanĝoj de internaciaj lingvoj, lingvopolitiko;
 - f) Komputika, kibernetika alizo al Esperanto.
- La konferenco celas doni detalan analizon de internaciaj lingvoj ankaŭ el la vidpunkto de neesperantistoj. Konataj lingvistoj estas invititaj. Prelegos interalie Victor Sadler (BSO — Nederlando), Claude Piron (Svislando), Katalin Horváth (Hungario) kaj Chen Yuan (Ĉinio).

La prelegoj daŭros 20 ĝis 30 minutojn kaj ilin sekvas diskuto. Sesioj okazos antaŭtagmeze 9—12 h kaj posttagmeze 14—17 h. La prelego-tekstoj aperos post la konferenco.

Oficialaj lingvoj: Esperanto kaj la angla.

Interkona vespero kun vespermango okazos la 15-an de aŭgusto je la 7-a horo.

Partopren-kotizo (kun interkona vespero kaj la konferenca eldonado)

700 forintoj/50 DM

pagenda al la konto de HEA ĝis la 31-a de majo. Post tiu dato la kosto altiĝas je 10%.

Partoprenantoj el socialismaj landoj sendu al la hungara konto de HEA: OTP VIII 2 18-98086/516-10 005 aŭ pagu surloke.

Anoncu kiel eble plej urĝe vian deziron partopreni!

POSET'88

De la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto 1988 ni aranĝos la IV Potsdaman Soman Esperantistan Tendaron (POSET). Ni denove povas akcepti nur 60 esperantistojn, kapablajn konversacii esperantlingve, — en nia tre bela kaj interesa distrikturbo. Tranoktado en 4-6 litaj ĉambroj, maten- kaj vespermangado — 130, M Lingvopraktikado kaj agrabla restado en amika etoso. Pliajn informojn kaj aligilojn petu de s-ino Brigitte Raabe, Sulzbacher Steig 1, Staaken DDR — 1546.

Limdato de aliĝo — 31-a de majo 1988.



INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO

Simile al la pasintjara arango Hungara Esperanto-Junularo denove organizas internacian junularan ferian semajnon en sudhungarlanda urbo Szeged inter 10-16-a de julio 1988, en la semajno tuj antaŭ la IJK. Por la partoprenantoj estos organizita karavana vojaĝo al IJK, okazonta en Zagrebo.

La programo antaŭvidas: bivakfajrojn, ekskursojn kaj aliajn distrajn programojn; kelkajn seriozajn programojn, kiel medioprotektado, politika forumo pri Hungario ktp.

La organizantoj atendas ĉirkaŭ 200 esperantistojn. Dum la semajno oni loĝos en aparta ripozejo en 3-6-litaj ĉambroj, tuj apud la rivero Tisza (Tibisko). Eblas ankaŭ tendumi per propra tendo. La partoprenkotizo inkluzivas: loĝadon, mangadon kaj programojn. Estas planata tuttaga ekskurso al Rumanio.

Junuloj el socialismaj landoj povas pagi surloke en forintoj, laŭ la kategorio de la aliĝilo, partoprenantoj el okcidentaj landoj pagu al UEA favore al la konto de HEJ (UEA kodo: heja-a)

Partoprenkotizoj:

- | | |
|---|--------------------|
| kategorio I. (loĝado en 3-4-litaj ĉambroj) | 2.400.—Ft/150.—gld |
| aliĝo post 1-a de majo: | 2.800.—Ft/175.—gld |
| kategorio II. (loĝado en 4-6-litaj ĉambroj) | 1.800.—Ft/115.—gld |
| aliĝo post 1-a de majo: | 2.200.—Ft/140.—gld |
| kategorio III. (loĝado en propraj tendoj) | 1.300.—Ft/80.—gld |
| aliĝo post 1-a de majo: | 1.700.—Ft/105.—gld |

Pliaj informoj kaj aliĝiloj haveblas ĉe:
HUNGARA ESPERANTO-JUNULARO
Budapest, Pk, 193, H-1368 Hungario

NI KONDOLENCAS

La 21-an de februaro 1988 en Varna en 82-jara aĝo, forpasis la veterano-esperantistino kaj emerita infaninstruistino MARA ALEKSANDROVA. Esperanton ŝi eklernis en 1932 kaj tuj komencis viglan korespondadon. Ŝi havis pli ol 100 gekorespondantojn el ĉiuj partoj de la terglobo. En 1957 ŝi estigis plenrajta instruanto de Esperanto kaj gvidis senpage multajn sukcesplenajn Esperanto-kursojn. CE de BEA ŝin dekoris per la Ora Insigno.

La Esperanto-societo „Albatroso“ en Varna, kiu estas unu el la plej malnovaj societoj en nia lando, fondita en 1904, perdis enu el siaj plej agemaj, modestaj kaj altkonsciaj membroj. La anoj de la klubo de veteranoj „Moiŝ Levi“ kaj de la klubo de la instruistoj „Zora Mladenova-Hans“ ĉiam memoros sian sindonan aktivulinon.

Ni kliniĝas antaŭ ŝia hela memoro.



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

SVETLANA TOPKAROVA — 5802 Pleven, kv. Storgozia bl. 52, vh. B, ap. 11 — kun ĉi pri ĉt.

NADJA GEORGIEVA (16-jara) — 1115 Sofio, kv. Mladost — IV^a bul. „B“ bl. 470, et. 4, ap. 101 — kun ĉi pri muziko, literaturo, sporto.

Grupo de komencantaj esperantistoj (15-60-jaraj) deziras korespondi kun ĉi pri ĉt. Komuna adreso: Esperanto-societo „Paco“, 3200 Bjala Satina, p. k. 134, SVETLANA ANDREEVA SAVOVA (18-jara) — Resen 5060, Velikotŝarnovsko str. Georgi Dimitrov 38 — kun ĉi pri ĉt.

ĈEHOSLOVAKIO

JULIA MARIANKOVA (30-jara) Partizanska 144, 916 24 Horná Streda — kun ĉi pri ĉt.

MIRCHAELA PITROVA, (17-jara) — Hollého 30, 010 01 Zilina — kun ĉi pri ĉt.

ALEXANDRINA VALJASKOVA, (17-jara) Cakovka 6, 010 01 Zilina — kun ĉi pri ĉt.

ing. BEATA BLASKOVA, (30-jara) — Pazite 35, 010 09 Zilina — kun ĉi pri ĉt.

HISPANIO

JUDIT RAMOS — Cal Tòfol E-08786 Vilanova D'Espòia, Katalunio/Hispanio — kun bulgaroj pri ĉt.

FRANCESCA RAMOS — Cal Tòfol E-08786 Vilanova D'Espòia, Katalunio/Hispanio — kun bulgaraj ĝejnuloj pri ĉt.

SUSSANA HOPPMAN — Modesto Domingo s/n E-08786 Vilanova D'Espòia Katalunio/Hispanio — kun bulgaraj ĝejnuloj pri ĉt.

RESPUBLIKO de KOREO

La Esperanto-Klubo „Kolombo“ en la HANKUK-Universitato por Fremdlingvaj Studoj, fondita antaŭ 3 jaroj, nun ege diligente klopodas por disvastigi Esperanton inter studentoj, kies fakoj estas 24 diversaj lingvoj (angla, araba, ĉina, germana, hispana, franca, hinda, indonezia, japana, persa, malaja, portugala, rusa, sveda, svahila, taja, turka, jugoslava, hungara, rumana, ĉeĥa, pola, itala kaj vjetnama). Por pli efektive propagandi nian lingvon mi volas ricevi leterojn el diversaj terĝlobo-partoj, kaj ilin mi disdonos al studentoj, kiuj volas interamikigi pere de Esperanto aŭ en sia faka lingvo. Nia adreso: Esperanto-Klubo „Kolombo“, HANKUK-Universitato, por Fremdlingvaj Studoj C.P.O. Kesto 4258, Seoul 100 Respubliko de Koreo.

POLLANDO

MARIOLA kaj KAZIMIERZ SLUZ (26 kaj 27-jaraj) — ul. Paderewskiego 14/131 PL-20-860 Lublin — kun — ĉi pri turismo, vojaĝoj kaj sporto.

ELIZABETA JANUSZ (33-jara) — 31-158 Krakovo, ul. Krowderska 74/3 — kun ĉi pri ĉt. Kolektas BK kaj PM.

ANNA JANUAZ (29-jara) — 31-158 Krakovo, ul. Krowderska 74/3 — kun ĉi pri ĉt. Kolektas BK.

KRYSTYNA JABLONSKA (30-jara) — 34-313 Pabarka 593 — kun ĉi pri ĉt. Kolektas BK.

SOVETUNIO

ANNE MASING (55-jara) — Tallinn, Köhleri 12-10 — kun ĉi pri teatro, ĝardeno, turismo.

HUBERT KAEV (22-jara) — 200 006 Tallinn, Kirs 5-16 — kun ĉi pri muziko, turismo, literaturo.

RUTH TERASMAA (25-jara) — 2000016 Tallinn, Harku 32 — kun ĉi pri ĉt.

ENHAVO

II Kunlaborado kun Unesko sur nacia nivelo (Dimităr Haĝiev)

1 Por paco sur la Balkanoj

2 Anoncoj pri ĉi-jaraj Esperanto-kongresoj

3 Juna Esperantisto: La eksperimento — problemoj kaj esperoj (Veneta Baleva)

4 Esperanto en la malliberejo (Stojan Konstantinov)

5 Propono: Ni bezonas esperantan legaĵon (Sonja Koleva kaj Ivan Ivanov)

6 Beletro: Unu rondiro de Sankta Georgo (Elin Pelin)

7 Originala verkaro: Violin Oljanov, Asen Josifov, Venelin Mitev)

8 Aĉetu en la librovendejo de BEA!

9 Nia sperto: Por fari la vivon pli riĉa kaj interesa (ing. Nikola Uzunov)

10 Leteroj de korespondamikoj

11 E-kalejdoskopoj

12 Esperanto kaj komputiloj (kts Kiril Velkov)

12 Kumeŝaŭa, la filo de la ĝangalo (Tibor Sekelj)

13 100 tagojn en Bulgario (Dang Dinh Dam)

15 Tra la mondo

16 Kiam, kie, kion

IV Esperanto kaj sporto (Nikola Nikolov)

Sur la unua kovrilpaĝo: Printempo.

Foto: Silva Zakarjan

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redakta komitato: Atanas ILKOV (redaktoro); Dimităr HAĜIEV; Georgi MIĤALKOV; Krăstju KARUCIN; Kunĉo VALEV; Libertaria MLADENOVA; Lidia RAEVA (respondeca sekretario); Mariana ELENOVA; Nikola NIKOLOV; doc. Stojĉo STOJĈEV; Venelin MITEV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado.

Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
E Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Stata presejo „Georgi Dimitrov“,
bul. Lenin 117

8157V

Esperanto kaj sporto

- IOM PRI LA ORGANIZITA ESPERANTO-TURISMO
- ĈU ESTOS ESTABLITA SPORTA ESPERANTO-FEDERACIO?
- KAMPANJO POR DISVASTIGO DE ESPERANTO INTER SOFIAJ SPORTISTOJ
- TURISTAJ E-TAGOJ EN MONTODOMO „EPERANTO“ KAJ FESTO DE REVUO „BULGARA ESPERANTISTO“

Sporto estas tre fekunda tereno, kie ni povas propagandi, disvastigi kaj organizi la aplikadon de Esperanto. La sportistoj dum internaciaj sportaj konkursoj kaj ludoj akre sentas la bezonon de facile lernebla internacia lingvo. Tia lingvo, sendube, estas Esperanto. Bedaŭrinde, internaciskale sur la sporta tereno ni malmulton faris. En kelkaj landoj oni fondis sportistajn Esperanto-teamojn kaj klubojn, estis eldonita sporta frazaro kaj terminaroj pri la plej popularaj sportoj, sed ĝis nun vasta Esperanta agado en sportaj medioj ne estis organizita. Ni devas lerni de niaj sukcesoj kaj malsukcesoj. Esperanto-turismo progresis dank' al la agado de „Monda Turismo“ — asocio, kies celo estas faciligo de la internacia turismo per aplikado de Esperanto. Antaŭ ĝia fondiĝo en 1970 la E-turismo grave postrestis de la vigla evoluo de la internacia turismo ĝenerale. „Monda Turismo“ sukcesis puŝi antaŭen la organizitan Esperanto-turismon. Se oni nin demandas, en kiu sfero la Internacia Lingvo estas plej vaste uzata kaj praktikata, ni povas sen troigo diri — en la sfero de turismo. Dank' al la intensa agado por Esperanto en sportaj medioj en kelkaj landoj jam estas espero, ke oni establos Sportan Esperanto-Federacion, kiu internaciskale kunordigos la agadon de la esperantistoj sur la sporta kampo.

La bulgara Esperanto-movado estas tre aktiva kaj relative amasa. Ĝi atingis konsiderindajn rezultojn kaj sukcesojn. Ŝtataj kaj aliaj instancoj subtenas nian agadon. Bulgara Esperantista Asocio disvolvas vastan fruktodonan agadon kaj dank' al tio ĝi estas rekonita kiel unu el la plej fortaj kaj viglaj landaj Esperanto-asocioj. Sed sur la sporta kampo ni — la bulgaraj esperantistoj, ĝis

nun malmulte agis. Konstatinte tion, mi kiel fakdelegito pri sporto de UEA en Sofio decidis organizi kampanjon por disvastigo de Esperanto inter la ĉefurbaj sportistoj. Ni, kelkaj sofiaj esperantistoj informados ilin pri Esperanto pere de flugfolioj, prospektoj, koloraj afiŝoj, filmoj kaj diapozitivaj. Estos organizita enketo pri la lingvaj malfacilaĵoj en la sporto kaj pri Esperanto. Intervjuoj pri Esperanto kun sportistoj aperados en revuo „Bulgara Esperantisto“. Ni klopodos starigi per Esperanto kontaktojn inter bulgaraj kaj alilandaj sportistoj. Post intensa agado ni kreos kondiĉojn por organizo de Esperanto-kursoj speciale por sportistoj, en kiuj la lektoroj instruos ne nur gramatikon, sed nepre zorgos paroligi la kursanojn. Similaj kursoj por turistoj regule okazas kun granda sukceso.

La organiza komitato por la Turistaj Esperanto-Tagoj okazontaj 9-12.6. 1988 en Sofio akceptis la proponon, ke en la lasta tago de la aranĝo apud montodomo „Esperanto“ okazu amasa sporta kurado. La kurado estos organizita de specialistoj kaj al la gajnintoj oni aljuĝos premiojn. Ĉiujare estos aljuĝata speciala transira pokalo.

Krome enkadre de la Turistaj Esperanto-Tagoj ĉi-jare okazos ankaŭ Festo de revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj sportaj konkuroj por la premio de „BE“. Por pli detalaj informoj turnu vin al Turista Sekcio ĉe BEA aŭ al la redakcio (telefono 22-80-86).

Mi estos tre kontenta, se nia agado en Sofio por Esperanto instigos similan aktivadon en aliaj centroj de la esperantista agado en Bulgario, eĉ en eksterlando. Ni ŝatus starigi korespondajn kontaktojn kun iliaj reprezentantoj.

Nikola NIKOLOV,
fakdelegito de UEA pri sporto kaj turismo